


Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Esperanto

116-a jaro • n-ro 1383 (10) | oktobro 2023



La enketilo pri UEA: unuaj rezultoj | 195

Premio Deguĉi aljuĝita al Madagaskaranino | 197

La 56-a ILEI-kongreso kaj la 79-a Internacia Junulara Kongreso | 202

La tri ĉefurboj de Esperanto | 204

Esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
Fondita en 1905 de Paul Berthelot
(1881-1910). Establita kiel organo de UEA en 1908
de Hector Hodler (1887-1920).

Misio:

Kvazaŭ anteno kaptanta la tendencojn, la ardon,
la aspirojn de la esperantoj ĉiulande, la revuo
Esperanto prezentu aktualan, interesan, inspiran
bildon pri la agado kaj strategio de UEA kaj pri la
evoluo de Esperanto en monda skalo.



Redaktoroj: Dmitrij Ševčenko, Anna Striganova
Korektisto: Rob Moerbeek
Kovrilpaĝa foto: Estraro de UEA en Torino

Artikoloj de privatuloj ne reprezentas oficialan sintenon
de UEA. La aŭtoroj respondecas pri siaj artikoloj
enhavaj kaj lingve.

Adreso de la Redakcio:
Revuo Esperanto, Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
tel.: +31 10 436 1044

<https://revuoesperanto.org>
redakcio@revuoesperanto.org

Aperas: en ĉiu monato krom aŭgusto.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.
Abonprezo: varias laŭlande;
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 5,00.
Ĝenerala Direktoro: Martin Schäffer

Anonctarifo (EUR):

1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300,
1/8 p. 165, 1/16 p. 90.

Movada rabato 50%.

Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble.

Rabato por tuja ripeto 20%.

Anoncetoj: 2€ por ĉiu vorto (oni ĉiam fakturas
minimуме €20,00). Mendu ĉe la CO.

Transpagaj informoj:

Banko: ING, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
Bankokonto: IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A

(Universala Esperanto-Asocio en
Rotterdam, Nederlando)

PayPal: financoj@co.uea.org



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:

Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando.

tel.: +31-10-436-1044

uea@co.uea.org www.uea.org



195

La enketilo pri UEA: unuaj rezultoj

Ĉiutage venas novaj respondoj, kaj plena
analizo bezonos almenaŭ ĝis la jarfino. Por
definitiva cifera analizo kun konkludoj ni
ĝojus atingi mil respondojn.



197

Premio Degučĉi aljuĝita al Madagaskaranino

UEA uzas la okazon anonci pri la premio
al Miora por gratuli ŝin kiel la unuan afri-
kanon al kiu la premio estis aljuĝita.



202

La 56-a ILEI-kongreso kaj la 79-a Internacia Junulara Kongreso

La kongresoj okazis en tre bela rezidejo,
Bella Italia, ĉe pinarbaro kun zumantaj
cikadoj. Tie ni loĝis en pluraj domoj di-
se en la arbaro kaj la programeroj oka-
zis en kvin malsamaj lokoj je diversaj
distancoj.



204

La tri ĉefurboj de Esperanto

Esperanto havas tri ĉefurbojn: Varsovi-
on, kie naskiĝis Esperanto kaj vivis ĝia
kreinto, Roterdamon, kie aktivis la mo-
derna UEA, kaj Herzberg am Harz – la
Esperanto-urbon.

Kulturo | 198
Kion Veĵdo faris kaj faras
por nia Esperantujo

Afriko vokas | 199
El Ĝambo Rafiki, verko
de Tibor Sekelj

Landa agado | 200
Tri someraj kunvenoj
en Israelo

Belartaj Konkursoj | 201
Alvoko al partopreno
en la 75a okazigo de la
BK de UEA

Kulturo | 203
Krimromano
esperantigita
kaj *Metropoliteno*
nederlandigita

Laste Aperis | 206

Edukado | 208
Pri EToSo

Virtuala Kongreso | 209
4-a Virtuala Kongreso
de Esperanto

UEA | 210
Novaj honoraj membroj
de UEA kaj nova
Honora Prezidanto

Kulturo | 211
Biblioteko Juan Régulo
Pérez en la Kolektiva
Katalogo de la Hispana
Bibliografia Heredaĵo

**Fake, Science kaj
Profesie tra la mondo** | 212
UEA invitas prelegi en
IKU 2024 en Aruŝo

Recenzo | 213
Reĝo Ubuo nun
groteskas ankaŭ
Esperante

Landa agado | 214
100 jaroj de Sarlanda
Esperanto-Ligo

Oficiala Informilo |
Forpaso | 215

Estraro

Prezidanto: D-ro Duncan Charters
(Kunordigo, Strategio, Biblioteko, Esploro
kaj Dokumentado)
PO Box 100, Elsau, IL 62028-0100, Usono
Tel. +1 618 374-2453
uea.prezidanto@aol.com

Vicprezidanto: S-ro Fernando Jorge
Pedrosa Maia Jr. (Centra Oficejo, Financoj,
Kulturo, Kongresoj, Reta Agado, Ameriko)
R. Andrade Pertence 42/503 Rio de Janeiro
RJ Brazilo 22220-010
Tel. +55 21 967767084
fmaiajr@gmail.com

Vicprezidanto: D-ro Amri Wandel
(Scienca kaj Faka Agado, Revuo Esperanto,
Terminologio, Meza Oriento kaj Norda
Afriko)
767 Makabim, 7179901 Modiin, Israelo
Tel. +972-54-454-8712
amriwandel@gmail.com

Ĝenerala Sekretario: S-ro Aleks Kadar
(Administrado, Delegita Reto, Rilatoj kun
Membro-Organizoj (Landa Agado), Rilatoj

kun TEJO, Statuta Reformo)
197 rue de Lourmel
FR-75013 Paris, Francio
Poŝtel. +33 6 86 58 00 20
alekska@gmail.com

Membro: S-ino Aurora Bute
(Instruado, Rilatoj kun ILEI, Eŭropo)
Str. Brândusei nr. 6, Sc. C, ap.1
RO-300626 Timișoara, Rumanio
Poŝtel. +40 758 899 289
aura.bute@gmail.com

Membro: D-ino Gong Xiaofeng
(Universitata agado ekster Eŭropo, Rilatoj kun
CED, Rilatoj kun edukado.net, Virina agado)
19-1-502, Jinyuan Yangguang, Xinjian
District, Nanchang, Jiangxi, Ĉinio
Poŝtel. +86 186 0791 0758
arko.gong@qq.com

Membro: D-ro François Lo Jacomo
(Informado, Eksteraj Rilatoj, Amikoj de
Esperanto, Esperanto-Centroj, Gemelaj Urboj)
72 quai de la Loire, FR-75019 Paris, Francio

Poŝtel. +33 6 80 88 53 27
francois@lojacomo.eu

Membro: S-ro Jérémie Sabiyumva
(Aktivula Maturigo, Afriko)
BP 170 Rumonge, Burundo
Tel. +257 79218342 / 69066457
jerrybs21@gmail.com

Membro: D-ro So Jinsu
(Eldonado, Azio kaj Oceanio)
Mapo-gu Tojeong-ro 158, Gangnam Bamsom
Xi Apt. 102-2401, Seoul 04080 Koreio
Tel. +82-10-8898-1818
so@kangnam.ac.kr

Observantoj de TEJO:
S-ro Michal Matuŝov
kaj S-ro Tyrone Surmon

Observanto de ILEI:
Ing. Ahmad Reza Mamduhi

Pli detale ĉe:
<http://www.uea.org/asocio/estraro>



La enketilo pri UEA: unuaj rezultoj

■ Duncan Charters,
Prezidanto de UEA

Kiel promesite, jen unua super-rigardo pri la rezultoj de niaj du enketiloj. Ĉiutage venas novaj respondoj, kaj plena analizo bezonos almenaŭ ĝis la jarfino. Por definitiva cifera analizo kun konkludoj ni ĝojus atingi mil respondojn (ni jam ricevis pli ol 800). Se vi ankoraŭ ne reagis, bonvolu tion fari nun, kun datlima etendo nur ĝis la 15-a de oktobro por inkluzivo en ĉi-jaraj kaj postaj studoj. Ni intencas disponigi la plenajn rezultojn kun grupigo de komentoj (senigitaj je identigoj, do anonimaj), se eblos en la reta versio de nia revuo. Tion ni anoncos. Jen denove la ligiloj:
por membroj de UEA: https://www.surveymonkey.com/r/uea_membroj;
por nemembroj: https://www.surveymonkey.com/r/uea_ne-membroj.

Antaŭnelonge, okazis bedaŭrinda ŝanĝo en la politiko de la posedanto de la enketilo SurveyMonkey, Momenitive. Tiu publika kompanio estis aĉetita de privata grupo de investistoj kiu konsilas ĉefe usonajn entreprenojn pri

internacia surmerkato de produktoj. Ekzistas listo de 7 landoj kaj 5 landaj regionoj kun kiuj usonaj kompanioj ne rajtas havi komercajn rilatojn, kaj cele al oboe de tiurilataj leĝoj kaj protekto de la klientoj, la grupo STG decidis bloki respondojn al enketiloj sendotaj el tiuj landoj kaj regionoj. Do se vi ricevos mesaĝon ke via respondo ne povos esti akceptita, jen la kialo. Mi sendis protestmesaĝon en kiu mi pledis por la principo de libera esprimado de opinioj, kiu devus gvidi en tiu situacio ĉar ne temas pri vendebla "produkto". Mi ankaŭ indikis ke pro tiu diskriminacio, ne plu eblos al mi aŭ al UEA utiligi iliajn servojn (por kiuj en tiu kazo mi persone pagis). Bedaŭrinde eĉ se ni rekreus la enketilon per alia servo, ne eblos integri respondojn en la originalan, do ni kredeble devas rezigni pri tiu aŭ alia solvo. Feliĉe tamen la blokiĝo okazis post la alsendo de la granda plimulto de respondoj kiujn ni ricevos, do la rezultoj restos relative reprezentaj kvankam ne plu tute, kaj ni pardonpetas al la koncernatoj pro tiu tute ne anoncita, ne atendita ŝanĝo, neniel rilata al la deziroj kaj politiko de UEA mem.

Do resume, kion ni eltrovis pri UEA kaj ĝiaj servoj al la Esperanto-komunumo?

1. Surprize, ne estas granda diferenco en la opinioj inter membroj kaj ne-membroj de UEA.

Kiel ni reagu al la konstato ke kaj membroj kaj ne-membroj preskaŭ egale taksas pozitive la valoron de niaj servoj? Estas normale ke gvidantoj ricevas pli da plendoj ol laŭdoj, sed la enketilo utilas por doni pli ekvilibran senton pri la sinteno de niaj membroj kaj ne-membroj.

2. Nur 6% de niaj membroj estas parte aŭ tute nekontentaj pri sia membreco.

3. Kvarono de la membroj estas treege kontentaj, duono sufiĉe aŭ plimalpli kontentaj. Ne malbonas ke 75% estas pli ol parte kontentaj, tamen ni devus celi eĉ pli altan proporcion, kaj precize por tio helpas la petitaj komentoj por orienti la Estraron kaj Komitatton al plibonigoj.

4. La plej uzataj servoj estas la revuo *Esperanto* (pli ol duono uzas la presitan formon, do tio restas popu-

lara kvankam pli da membroj elŝutas la retan version); preskaŭ duono uzas Eventa Servo, <https://eventaservo.org>, do bonega konfirmo pri tiu investo por la membroj kaj atentigo pri ĝia utilo ki-el kalendaro por tiuj kiuj ankoraŭ ne konas ĝin; plej popularaj post tio, pli ol 20%, estas la Delegita Reto kaj UEA Facila, do ambaŭ provizas daŭre utilajn servojn al malnovaj kaj novaj membroj, kaj la novajn UEA kompreneble havu la devon flegi dum ilia lernado de la lingvo.

5. Ĉiuj servoj estas konataj de minimume 10% el la membroj, sed evidente lamas informiĝo kaj uzado de plej multaj el ili, do tion devos atenti la Estraro en nia prioritato de planado, kaj eble informado pri la apartaj retejoj kaj servoj en la (efektive legata) revuo helpus pri tio. Aparte pro tio ke esprimiĝas okazaj opinioj ke UEA provizas nenion utilan! Pluraj servoj ne bezonas grandan elspezon por ilin konservi, do ni atentu la konkludojn de prioritato antaŭ ol decidi ion forigi. Ne ekzistas evidentaj kandidatoj por tio!

6. Pri la revuo *Esperanto*, malpli ol 5% de la membroj estas tute nekontentaj pri ĝi. Do la bruo de kritikoj ne

represas la ĝeneralan opinion. La Estraro kaj redaktoroj tamen atentis ĉiun komenton kaj rekomendon por plibonigo, kaj ni ricevis sufiĉe multajn. Tamen pli ol duono de la membroj konsentas pri la opinio ke “ĝi estas akurata, informriĉa, bone ilustrita kaj redaktita”.

7. La opinioj pri niaj Universallaj Kongresoj estas absolute klaraj. La ĉeestaj restu ĉiujaraj, sed estu maksimume hibridaj por faciligi ĉies partoprenon, ĉar 30% el la ŝatantoj de la UK-oj ne povas persone partopreni. Kvarono el la membraro preferas Virtualan Kongreson, kaj povas partopreni, do la aranĝo kiu kontentigus plej multajn membrojn estas ĉiujaraj ĉeestaj kun maksimume hibridaj elementoj, kaj ankaŭ Virtualaj. La membroj konsciu ke tio bezonas pli da homfortoj kaj monrimedoj ol nur la tradicia ĉeesta UK, tamen ni jam laŭiras tiun vojon.

8. 85% de niaj membroj kredas la centran Libroservon nemalhavebla, esenca aŭ gravega servo.

9. Kvankam preskaŭ duono el la membroj ne bezonas paperan *Jarlibron*, preskaŭ sama nombro deziras aŭ sopiras ĝin rehavi. La ideo de trijara Al-

manako ŝajnas solvi la dilemon, eĉ sen presita delegita reto (ekzistas nun leĝaj problemoj pri tio rilate personajn datumojn), ĉar pli ol duono de la membroj pretas pagi aldonan koston por havi ĝin. Klara mesaĝo: bonvolu tion aranĝi!

10. Rilate la malfacilan demandon de publikaj deklaroj de UEA, opinioj iras la gamon de unu ekstremo al alia, tamen la decide plej elektita pozicio (40%) estis “Ĝeneralaj deklaroj kontraŭmilitaj kaj porpacaj estas en ordo, nenio pli specifa”, do ne malkongrue kun tio kio efektive okazis lastatempe, sed kun la preskaŭ 20% kiuj insistas pri absoluta statuta neŭtraleco, do neniu ajn deklaro, sufiĉe averta ke UEA estontece certe ne elpaŝu pli ol ni efektive faris.

Mi finos kun granda ĝojo, kaj pri tio ni kunlaboros en nia strategia planado:

Vi, niaj membroj, deziras labori kaj pretas aktive aliĝi al laborgrupo kun specifa celo! Dankegon pro via sindediĉo! Tion do ni organizu, kaj ni kontaktos vin...

EVENTA SERVO

Eventa Servo (<https://eventaservo.org>) estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde.

Diskonigu Esperanto-eventojn tutmonde

Premio Deguĉi aljuĝita al Madagaskaranino

UEA starigis la Premion Onisaburo Deguchi, aŭ Premion Deguĉi, en la Jubilea Jaro 1987, pere de fonduso proponita kaj starigita de Esperanto-Propaganda Asocio de Oomoto (EPA), faka organizaĵo en kunlaboraj rilatoj kun UEA. La premio distingas meritajn agantojn, kiuj longtempe laboras per Esperanto, por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la ideo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de religia gvidanto de Japanio, Onisaburo Deguchi (Deguĉi). Spegule al iliaj ideoj la premio ankaŭ celas honoriti tiujn, kiuj pleje kontribuas al la realigo de la bazaj celoj de UEA.

La Premio Deguĉi konsistas el diplomo kaj monsumo de 1000 EUR. Ĝis nun 30 homoj kaj 8 iniciatoj estis premiitaj kaj nun estas anoncata la 31-a homo. Per decido de la Estraro de UEA la Premio Deguĉi de la jaro 2023 estas aljuĝita al: Miora Raveloharison

Miora Raveloharison

Doktorino Rasoharinaivo Mioranantenaina, pli konata kiel Miora Raveloharison, naskiĝis la 20-an de aŭgusto 1980 en Antananarivo, la ĉefurbo de Madagaskaro. Ŝi estas lertigistino kaj nuntempa membro de la Afrika Komisiono de Universala Esperanto-Asocio, respondeca pri virino agado kaj kulturo. Ŝi kaj la edzo estas gepastoroj, gepatroj de juna filo, Jonathan.

Ŝi konatiĝis kun Esperanto kiam ŝi studis en liceo, en 1997, per libreto verkita en multaj lingvoj, unu el tiuj Esperanto. Pro scivolemo ŝi esploris pri la lingvo kaj ekleris ĝin. Helpis ŝin kompletigi sian lernadon kaj definitive esperantistiĝi la libro *Dio estas Amo*, de la bretono Erwan ar Menga.

Laborante en la sudorienta parto de sia lando, ŝi trovis okazon komenci instrui Esperanton kaj anoncis sian kurson en la regiona radio dum 15-minuta programero. Tiam aperis ŝiaj unuaj 23 gelernantoj. Ŝi ne plu ĉesis instrui la lingvon. Ŝi aparte instruas al infanoj kaj gejunuloj, uzante instrumentodon bazitan sur la uzo de kantoj, ludoj, ekskursoj kaj kulturaj interŝanĝoj, donante plezuron al la sperto lerni.

Frue post sia lernado ŝi komencis korespondi kun aliaj malagasaj esperantistoj kaj ekaktivis en la landa movado. Ŝi partoprenas en diversaj agadoj, movadaj, edukaj kaj socielaj. Ŝi ofte prelegas, gvidas trejnadon, organizas konferencojn kaj kongresojn, diversfoje dividante siajn spertojn, cele ĉefe al la evoluigo de junulinoj kaj virinoj. Kun Alexandre Omba el D. R. Kongo ŝi fondis Esperantistan Virinan Asocion en Afriko (EVAA) kaj en 2018 organizis la 1-an Afrikan Kongreson por Virinoj (AKVo), kiu okazis en Madagaskaro. Ŝi nuntempe estas en sia dua mandato kiel membro de la Afrika Komisiono de UEA. Ekde 2008 ŝi ankaŭ estas prezidantino de la madagaskara sekcio de Kristana

Esperantista Ligo Internacia (KELI). Ŝi estas kunlaboranto en agado de la Universitato de Seviljo, kunordigita de Prof. Vicente (Viko) Manzano Arrondo. Ŝi lastatempe kunlaboras kun aliaj malagasaj esperantistoj por revigligi la landan asocion de UEA kaj ĉiujn sekciojn de aliaj Esperanto-organizaĵoj en Madagaskaro.

Ja renkontiĝoj en ŝia lando aŭ en aliaj landoj, inter homoj de diversaj kulturoj en la mondo, fizike aŭ virtuale, markas la ĉiutagan Esperanto-vivon de Miora. Por ŝi Esperanto estas grava, aplikata kiel ilo por paca komunikado kaj disvolviĝo de solidareco kaj empatio inter homoj. Por ŝi la Esperanto-mondo estas mondskala interŝanĝejo, kie homoj estu instigitaj malkovri unuj la aliajn, ricevi, kunhavigi, ĝui la diversecon de la mondo. Ŝi laboras por ke Esperanto malfermu al homoj pordon al mondkomunikado.

UEA uzas la okazon anonci pri la premio al Miora por gratuli ŝin kiel la unuan afrikanon al kiu la premio estis aljuĝita, kaj ankaŭ al EPA pro ĝia 100-jariĝo en 2023. La Premio Deguĉi estas inter la plej prestiĝaj de la Esperantomovado.



Kion Vejdo faris kaj faras por nia Esperantujo

Elena Popova

Unue mi prezentu *Penseo* al niaj legantoj. Ĝi estas la nomo de monata beletra revueto publikigata en Esperanto. *Penseo* estis kreita en la jaro 1990 kaj daŭre aperas senhalte ĝis nun dum 34 jaroj. Jam 382 numeroj enmondiĝis al la Esperanta publiko. Esperantistoj el diversaj landoj sendas kontribuojn de poemoj kaj rakontetoj al la ĉefredaktoro kaj post lia kontrolo ili surpaperiĝas. Komence *Penseo* estis presita mimeografe kaj en 1997 ĝi ekbitiĝis kaj surretiĝis. Ĝi pasis tra la manoj de kvar ĉinaj ĉefredaktoroj: Guozhu, Sceto, Anteo kaj Vejdo. Nun ĝin redaktas Vejdo. Antaŭe ĝi havis nur kvar paĝojn. Post transpreno de la redaktado fare de Vejdo en la jaro 2000 ĝia spaco atingas 12 paĝojn, trioble pli ol la antaŭaj. Kompreneble ĝia enhavo estas pli riĉa. Inter kontribuintoj aperas eĉ elstaraj esperantistoj, kiel Berveling, Anteo, Liven Dek, Paulo Sinas, Tiberio Madonna, Kris Long, Meva Maron, Imre Szabó kaj aliaj. Kiel la ĉefredaktoro Vejdo penas plibonigi la revueton per belaj titoloj kaj bildoj, kaj kompreneble per bonkvalitaj beletraĵoj. Pro tio *Penseo* rikoltas laŭdojn de la legantoj.

Antaŭ kvin jaroj mi okaze legis la revueton kaj tuj ekŝatis ĝin. Ĉiumonate mi regule legas la revueton atente kaj akiras multe el ĝi. Kaj mi ankaŭ faras kontribuojn al ĝi. Vejdo estas vere

helpema. Li eĉ faris korektojn al miaj kontribuoj. Krome li ankaŭ helpis kontroli la lingvaĵon de libro mia antaŭ ĝia eldoniĝo. Mi tre dankas lin. Mi tre ŝatas, kion li diris: "*Penseo* estas bona ĝardeno por esperantistoj por publikigi siajn poemojn kaj eseojn... Kiel redaktoro mi kuraĝigas legantojn kaj aliajn esperantistojn praktiki sian Internacian Lingvon por Esperanto-literaturo." Vejdo mem laboreme kulturas la ĝardenon kaj akiras riĉan rikolton. Li kolektis poemojn aperintajn en *Penseo* kaj publikigis kelkajn poemarojn, kiel *Cindy McKeen ĉineskas*, *Jadranka Miric ĉineskas*, *300 Sopir-al-sudoj*, *300 Deksesilaboj*, *Sekretaj ĉineskoj* kaj aliaj. Fakte li mem estas poeto kaj li produktis pli ol mil ĉineskajn poemojn dum la tempdaŭro en sia redaktado de *Penseo*. En 2019 li ricevis per la poemo *Knabo dum rifuĝado* honoran mencion en la poezia branĉo de la Belarta Konkurso de UEA.

Dum ĉi tiuj lastaj jaroj, kiam Vejdo ekvizitis fejsbuk-retejon, li fondis du grupojn: *poemoj de ĉina antikva poezio* kaj *ĉinesko-ĉinstilaj poemoj*, kaj li mem aperigis multajn poemojn tradukitajn de li kaj aliaj esperantistoj el aliaj landoj. Lastatempe li elpuŝis videoserion de deklamado de poemoj el *la Libro de Poezio* tradukita de li. Tiuj deklamantoj estas el diversaj landoj, kio fakte fariĝas internacia evento. Mi vere admiras lian aktivecon kaj tre ŝatas tiujn videojn kun la ĉina kulturaj trajtoj.



Krom tio Vejdo ankaŭ estas tradukisto. Tre frue en 1984 li jam tradukis la romanon *La Familio*, verkitan de Bakin, la granda ĉina verkisto. Pro kelkaj kialoj la libro estis publikigita nur en 1990 (Ĉina Esperanto-eldonejo, Pekino). En 2018 *La sieĝata fortikaĵo*, verkita de Qian Zhongshu, kiun li tradukis, publikigis (Serio Oriento-Okcidento N-ro 54, Fremdlingva Eldonejo, Pekino). Krom tiuj eldonitaj romanoj li ankoraŭ havas kelkajn manuskriptojn de tradukoj de romanoj aŭ noveloj, kiel *Urbeto ĉe limo*, verkita de Shen Chongwen, *En profunda korto*, verkita de la tajvana verkistino Chiung Yao, *Ruĝa sorgo*, verkita de Mo Yan, kaj aliaj, kiuj sin trovas sur la retejo Lernado de Esperanto funkciigita de Vejdo sola.

Sed ŝajnas al mi, ke li havas pli grandan intereson pri tradukado de ĉinaj antikvaj poemoj. Laŭ lia sciigo, li esperantigis *300 ci-poemojn de Song-dinastio* (jam eldonita de MAS en Kubo, 2019), *300 qu-poemojn de Yuan-dinastio* (jam eldonita de MAS en Kubo, 2021), *300 poemoj de Tang-dinastio en Esperanto* (kuntradukita), *300 Ĉinaj antikvaj poemoj en Esperanto* (kuntradukita), *340 ĉinaj modernaj poemoj en Esperanto* (kompilita), *La Libro de Poezio en Esperanto* kaj *100 ĉinaj kantoj en Esperanto*.

Mi konas lin kiel laboremanto, seriozan kaj helpeman homon. La atingoj de Yida Wei / Vejdo en nia Esperantujo meritas nian atenton. Pro tio mi konigas liajn aktivaĵojn al miaj samideanoj.



El Ĝambo Rafiki, verko de Tibor Sekelj (1912–1988)



**Pri la «Karavano de Amikeco», kiu iris de Egiptio al Tanganjiko¹ en la jaro 1962.
Tanganjiko iĝis sendependa en 1961.**

■ Kompilis Mireille Grosjean

Unua ĉapitro: Kial ĝuste al Afriko?

(...) La ekspedicio tra Afriko respondas al unu el la nepraj bezonoj de nia epoko.

Se ni kredas, ke iu povus bezoni nian amikecon, tio nun estas sendube Afriko. La popoloj de tiu kontinento, ĝis nun neglektitaj kaj ekspluatitaj, kreis kaj kreadas siajn memstarajn ŝta-



tojn. Jen politika sendependeco. Sed ĝi ja ne estas ĉio. Ne sufiĉas starigo de kontaktoj sur nivelo de ŝtatistoj. Intimaj kontaktoj kaj amikiĝoj inter la simplaj homoj el Afriko kaj la homoj de aliaj kontinentoj, kiuj povus ilin konsideri homoj, estas necesaj hodiaŭ pli ol la ĉiutaga pano.

Nia ekspedicio intencas fari ion tiurilate.

Afriko dum la lastaj jaroj fariĝis centro de la mondo. (...) Malmultaj scias, ke sur tiu kontinento iam, antaŭ la alveno de blankuloj, floris imperioj kaj reĝlandoj kun alte evoluintaj kulturcentroj, kun eksterordinare bona organizo kaj socia ordo.

Ĉu multaj scias, ke en la urbo Timbuktu, ĉe la rivero Niĝero jam en la 14-a jarcento la universitato estis tiel alte taksata, ke sciencistoj el la tuta araba mondo venadis tien por iom pli ellerni «de la negraj doktoroj»?

(...) La kaŭzo de tiuj antaŭjuĝoj estas nekono. Nekono de individuoj, de individuaj ecoj kaj agoj. Ĉiujn eblajn ecojn de individuo, pro nekono, oni ĝeneraligas per rasaj karakterizoj ĉerpitaj el rakontoj tre unuflankaj, el malabundaj informoj donitaj de jarcenta malamiko en konstanta rasa batalo kun la afrikaj popoloj.

Tiu ĉi starpunkto de la plejmulto de la blankuloj povas esti ŝanĝita nur per abunda informado pri la homoj kiel individuoj, pri la homaj rilatoj de la negroj². Per multflanka informado pri Afriko kiel grundo. Pri la belaj kaj malbelaj de la pejzaĝo. Pri la homo, kiu loĝas sur tiu kontinento, pri lia socio kaj kulturo. Pri liaj ĝojoj kaj zorgoj. Kaj prezenti la Afrikanon kiel homon. Kiel individuon. (...)

¹ Tanganjiko estas la eksa nomo de Tanzanio

² Anstataŭ vorto "negro" nun uzatas la vorto "nigrulo"



Afrika Bulteno

estas la oficiala bulteno

de la Afrika Komisiono de UEA. Oni povas elŝuti ĝin ĉe:

<https://www.esperanto-afriko.org>

Tri someraj kunvenoj en Israelo

■ Amri Wandel

Kvankam fizike ĉeestis nur tri s-anoj, la somera Landa Kunveno de ELI, okazinta en julio, estis unu el la plej sukcesaj en la lastaj jaroj. Tiu ŝajna kontraŭdiro kompreneblas ĉar temis pri la unua *hibrida* Landa Kunveno de ELI, kun granda internacia partopreno. Ĝi okazis per Zoom, kiel la Tel-Aviva klubo jam delonge faras regule por siaj semajnaj kunvenoj. Partoprenis entute pli ol dudek s-anoj, ĉ. duono eksterlandanoj, kaj ankaŭ pluraj israelaj s-anoj partoprenis virtuale. Komence Luiza Carol prezentis rakonton el sia nova libro *Aliaj pordoj malfermiĝas* (<https://mallonge.net/13s>); poste Inbar Mor kantis en Esperanto kaj Cristoph Frank montris novajn fotojn de la Israela Kongreso kaj Postkongreso. Laste Amri prezentis fotojn kaj impresojn el la 100-a Germana E-Kongreso. La tuto estis registrita kaj estas spektebla en <https://mallonge.net/13t>.

Post tiu magra fizika ĉeesto, estis bela surprizo renkonti dudekon da partoprenantoj en la tradicia Somerfina Renkontiĝo de ELI okazanta fine de aŭgusto en la jam kutima restoracio en Tel-Avivo. En la kunveno, organizita de Jehoŝua Tilleman, partoprenis ankaŭ pluraj junaj personoj, inter ili novuloj kiuj lernis Esperanton per Duo-lingvo. Du s-anoj eĉ kunportis la nepojn, kiuj espereble ŝatis la kunvenon kaj sekve benos la geavojn. Por la plimulto de la partoprenantoj tio estis la unua ĉeesta kunveno post la Israela Kongreso en aprilo, ĉar nur malmultaj fizike partoprenis la Landan Kunvenon en julio. Krom viglaj konversacioj kaj bongustaj picoj, okazis ankaŭ "kultura" programo: Amri rakontis



tiis spertojn de la UK en Torino, prezentante diversajn librojn kaj aliajn dokumentojn de la Kongreso. Estis disdonita la nova duobla n-ro de *Israela Esperantisto* (56-paĝa kun pluraj artikoloj pri la Israela Kongreso, <https://mallonge.net/13u>). Estis prezentita la nova libro de Luiza, la albumo de la Israela (Post)Kongreso, donacita al Ŝulamit, kaj aliaj libroj el la kongresa sako kaj rikolto de la UK.

Komence de septembro okazis *hibrida kunveno* pri la UK en Torino, fizike en la klubejo en la Alon-turo kaj virtuale en la kutima Zoom-adreso. Amri prezentis fotojn de la UK kaj oni povis vidi artikolojn pri la UK en la septembra revuo *Esperanto*. En la posta estrarkunsido de ELI estis traktitaj i.a. la venonta Israela Kongreso (verŝajne okazonta en la suda urbeto Jeruĥam, dum la unua duono de aprilo 2024), redakta komisiono por *Israela Esperantisto*, kaj la Zamenhofa Vespero (18.12).

Du favoraj artikoloj: pri la UK en Torino kaj Esperanto en Jerusalemo

Favora anglalingva artikolo pri Esperanto kaj la UK en Torino aperis en junio en la internacia juda gazeto *JNS* (<https://mallonge.net/13v>).

Ĝia titolo diras "Parolantoj de Esperanto kunvenos en Italio" kaj la titolfoto montras la du ĉefajn intervjuitojn, Margaret Zamenhof kaj Amri Wan-

del. La verkinto, la Sri-Lanka ĵurnalisto Avi Kumar, intervjuis ankaŭ prof. Paul Frommer el la univ. de suda Kalifornio, verkinto de la Na'vi-lingvo por la filmo *Avatar* (2009), kiu diris en la intervjuo ke Esperanto estas senkompare la plej sukcesa el ĉiuj artefaritaj lingvoj.

En septembro aperis artikolo pri la historio de Esperanto en Jerusalemo, en la jerusalema gazeto *Kol Hair* (La urba voĉo). Ĝi rakontas pri la ĉefaj personoj kiuj influis la historion de Esperanto en Jerusalemo en la dudeka jarcento. Post detala fono pri Zamenhof la artikolo priskribas la E-aktivulojn en Jerusalemo. De la okulisto kaj lingvisto Aharon Meir Mezia, kiu en 1908 fondis la unuan E-societon en Jerusalemo, tra la renoviganto de la hebrea lingvo, Eliezer Ben-Jehuda, kiu en sia gazeto dediĉis tutan paĝon al la unua tutlanda E-kongreso en Jerusalemo en la jaro 1925, la rabeno kaj biblia esploristo prof. Ezra Cijon Melamed, kiu enmigris el Irano, publikigis la unuan E-hebrean vortaron en 1938, Imanuel Olsvanger, Natan Ben-Cijon Havkin, Josef Kohen-Cedek kaj Ĥanoĥ Rosak, kiu verkis kaj eldonis en la 50-aj la E-Jidan vortaron kaj iniciatis la nomdonon de la Zamenhof-strateto kaj Zamenhof-domo en kiu li loĝis, kiuj ekzistas ĝis hodiaŭ. Kvankam hebrelingva, la artikolo de la jerusalema aŭtoro Adam Akerman estas leginda eĉ per aŭtomata tradukilo: <https://mallonge.net/13w>.

Alvoko al partopreno en la 75a okazigo de la Belartaj Konkursoj de UEA

■ Miguel Gutiérrez Adúriz
Sekretario de la Belartaj
Konkursoj de UEA

Geamikoj, en BK-2023 ni havis la duan plej altan partoprenon en la BK-historio, nome 180 konkursaĵojn, t.e. nur 6 verkojn malpli ol en la rekorda jaro 2021, kaj 7 verkojn pli ol pasintjare. La konkursaĵoj venis el 31 landoj kaj tiel el veteranaj agnoskitaj plumoj, kiuj donas prestiĝon al BK, kiel el novaj valoraj beletremuloj, kiuj donas promesprenan perspektivon al la panorama de la E-literaturo.

Kun aparta ĝojo ni konstatis la kreigon de ĉiam pli granda kaj interesa plejado da BK-ŝatantoj, kiuj esploras diversajn ĝenrojn, lingvaĵojn, stilojn... kun la intenco krei novajn mondojn kaj vibrojn per la lingvo Esperanto.

Kun sama ĝojo ni spertis la ĝeneralan intereson de la E-publiko al nia afero. En la reto, la fejsbuka grupo "Amikoj de la Belartaj Konkursoj de UEA" havas jam pli ol 1000 aliĝintojn. Kaj la nombro da varmaj gratuloj ricevitaj, jen letere, jen persone, kadre de Esperantaj kongresoj kaj renkontiĝoj, igas nin antaŭeniri ĉiam pli firme, dankeme, entuziasme.

Pro ĉio ĉi, la Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA, krom esprimi tiujn ĝojojn tiukaŭze spertitajn de la gvida BK-skipo, instigas beletremulojn eĉ superi la pasintjarajn rekordajn nombrojn da konkursaĵoj partoprenante per altkvalitaj verkoj en BK-2024.

La rezultojn oni anoncos kadre de la 109-a Universala Kongreso de Es-

peranto en Aruŝo (Tanzanio). Kiel kulture, partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Endas sekvi jenajn regulojn:

Poezio: maksimuma longo: 500 vortoj.

Prozo: maksimuma longo 200 x 65 karaktroj (kvino da paĝoj).

Mikronovelo: (maksimuma longo 100 vortoj). La unua premio nomiĝas Premio *Paula Adúriz*.

Teatraĵo: maksimuma longo ne fiksita.

Teatraĵo, subbranĉo Monologo (unu-persona teatraĵo) aŭ Skeĉo (unu-aŭ divers-personal): daŭro inter 10 kaj 15 minutoj. La unua premio nomiĝas Premio *María Cuevas*.

Eseo: teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo, proksimuma longo 400 x 65 karaktroj (deko da paĝoj). La unua premio nomiĝas Premio *Luigi Minnaja*.

Infanlibro de la Jaro: originala aŭ tradukita libro por infanoj presforme aperinta en 2023. Aljuĝata estas nur unu premio.

Kantoteksto: maksimuma longo ne fiksita.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2024.

Oni sendu po unu tajpitan ekzempleron de ĉiu konkursaĵo – krom en la branĉo Infanlibro – al Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Miguel Gutiérrez Adúriz, prefere retpoŝte al unu el jenaj adresoj: belartajkonkursoj@gmail.com; bk@co.uea.org; aŭ, se tio ne eblas, papere al la adreso: los Coterios 1-C, 2 Izda, 390600 Muriedas; Cantabria; Hispanio, indikante la elektitan pseŭdonimon por gardi la anonimecon de la aŭtoro. Por la branĉo Infanlibro oni sendu unu ekzempleron de la koncerna libro al la adreso de Miguel Gutiérrez Adúriz kaj tri ekzemplerojn al Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando (menciante la fakton, ke temas pri ekzempleroj por partopreno en la Belartaj Konkursoj).

Premioj: En la branĉoj Poezio, Prozo, Teatraĵo kaj Eseo: unua premio 260 €, dua premio 182 €, tria premio 104 €. En la branĉo Infanlibro de la Jaro 546 €. En la branĉoj Mikronovelo kaj Kantoteksto, kaj en la subbranĉo Monologo aŭ Skeĉo: unua premio 100 €, dua premio 25 €, tria premio 25 €. Cetere, la tekstoj ricevinta la unuan premion en la branĉo Kantoteksto estos muzikigitaj, kaj la rezulta kanto estos diskonigita en ludado fare de kantisto aŭ kanto-grupo.

Detala regularo troviĝas en la retejo de UEA. La verkoj de la Belartaj Konkursoj, premiitaj en 2024, legeblas en la volumo *Belarta rikolto 2024*, eldonota de Mondial. La premiolistoj ekde la komenco de la Belartaj Konkursoj en 1950 troviĝas ĉi tie: <http://esperanto.net/literaturo/bk/index.html>.

La 56-a ILEI-kongreso kaj la 79-a Internacia Junulara Kongreso

■ Liba Gabalda



Ambaŭ kongresoj komune okazis tuj post la Universala Kongreso en Torino. De tie ni translokiĝis al Lignano Sabbiadoro ĉe la marbordo. Al la ILEI-Kongreso aliĝis 157 esperantistoj el 30 landoj kaj la IJK arigis 98 partoprenantojn el la tuta mondo. La kongresoj okazis en tre bela rezidejo, *Bella Italia*, ĉe pinarbaro kun zumantaj cikadoj. Tie ni loĝis en pluraj domoj dise en la arbaro kaj la programeroj okazis en kvin malsamaj lokoj je diversaj distancoj. La kongreso de ILEI estis hibrida, do aliaj esperantistoj, kiuj ne havis eblecon ĉeesti pro manko de vizoj aŭ pro aliaj kaŭzoj, povis profiti de kelkaj programeroj rete de sia hejmo kaj samtempe eblis interveni aŭ prezenti siajn prelegojn. Tio estas granda avantaĝo kaj ŝparo de vojaĝkostoj por multaj samideanoj. Okazis multaj samtempaj programeroj kaj ni povis ĉeesti alterne iun ajn el ambaŭ kongresoj.

La ĉefa temo estis: "Intergeneracia kunlaboro pri edukado – instrui Esperanton en lernejoj". Ĝi estis plene reprezentata en la komuna programo.

Okaze de la inaŭguro, en la salono Zamenhof, bonvenigis nin la jenaj reprezentantoj: Bruĉo Kasini, Laura Brazzabeni, Alessandra Madella. Nome de la junularo salutis la nuna prezidanto de TEJO Alberto Stalin Garrido kaj la venonta prezidanto Tyron Surmon. La ĉefparoladon prezentis la prezidanto de UEA Duncan Charters. Oni legis diversajn salutojn de lokaj instancoj kaj de aliaj esperantistaj asocioj. Rete salutis la prezidanto de ILEI Ahmad Reza Mamduhi. Honoris nin

la ĉeesto de la jam menciita prezidanto de UEA, de la sekretario Alex Kadar kaj de la ĝenerala direktoro Martin Schäffer. Post la inaŭguro ni komune fotiĝis.

Dum la komunaj kongresoj okazis lingva festivalo, kursoj por komencantoj kaj por progresantoj, prezento de E-instruiloj en la bildkarta varbado, Trejnseminario – "Interkultura kompetento", Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo en la mondo, Frazologio, Lernolibroj de Esperanto, La vojo al perfektigo, Lerneja agado inter Francio, Slovenio kaj Rusio, E-instruado en ĉinaj lernejoj, Kutimoj, Tradicio kaj historio de Ukrainio, 60-jariĝo de la revuo *Kontakto*, La 30 oraj horoj, Flagoj de la prelegantoj, Vivi kaj vivigi la lingvon, E-movado en Malagasio, Enkonduko al ĵurnalismo, Movadaj spertoj en Sud-Ameriko, La projekto Verden en rilato kun instruado, Ludforma origamia ateliero, Origamio kiel arto kaj scienco, Karaokeo, Duolingo, Birda migrado en la Amerikoj, Tanzanio kaj la UK en 2024. Estis pluraj prelegoj kaj sciigoj pri Litovio kaj Ukrainio, Ĉernobil, Homaj rajtoj en Pakistano, Instruado de la kroata lingvo, Instrui lingvon al pliaĝuloj. EkItalio – malkovro de la lando per vojaĝo inter la dudek regionoj de Italio kaj per rigardo de iliaj kulturoj kaj tradicioj. Interesa estis la prelego pri "Bonkvalita teo similas al belulino".

Krome okazis la AMO (Aktivula MaturiĝO)-seminario 102 kun la titolo: "Interkulturo en Lernejoj". Estis diversaj

diskutoj kaj interŝanĝoj pri instruaj spertoj. "Forumo por lernejoj instruistoj", "Scienca simpozieto". Eblis lerni Esperanton per afrikaj lingvoj kaj (inverse) afrikajn lingvojn per Esperanto. Bone funkciis ankaŭ la libroservo.

Estis proponitaj allogaj duontagaj kaj tuttagaj ekskursoj: Udine, Marano Lagunare, Aquileia kaj Grado, Venecio kaj Murano, Triesto kaj la Groto Giganta, San Vito al Tagliamento kaj San Daniele del Friuli.

Vesperaj programeroj konsistis el koncertoj de JoMo, Ĵomart kaj Nataŝa, Muzikalo I: "Petveturaj aventuroj", Muzikalo II: "La sorto gvidos vin". La gejunuloj okazigis "Movadan Foiron" kaj organizis frandan vesperon "Trinkomanĝa nokto" kun bongustaĵoj el la tuta mondo. Post ĉiuj vesperaj programeroj ili dancis laŭ diversaj ritmoj kaj amuziĝis ĝis la tria horo en gufujo.

Eblis spekti filmojn, praktiki jogon, ĉigongon, aikidon, internaciajn popol-dancojn, krei sian unuan retejon aŭ korean paperan ventumilon, aperis ludforma origamia ateliero, kvizo, teatraĵo "Edukado por paco", Metropola tut-eŭropa trajnreto, La Granda Homa Ĉeno – Ma-Ga filmo. Eblis sporti kaj ĝui la plaĝon. Gejunuloj prezentis la venontan IJK, kiu okazos en Litovio.

Okazis kunvenoj de BEMI, la Komitato de ILEI, Asembleo de Itala Instituto de Esperanto, Prelegoj pri famaj virinoj: Luisa Spagnoli, Antonietta Bernadoni, Verda Majo, Paola Masino, Tina Modotti, Maria Montessori, Flan-



nery O' Connor, Marjorie Boulton, Marie Skłodowska-Curie, la fratoj Anna kaj Helene Michelau – du artistinoj el Orienta Pruslando, Danica Bedekovic' Pobjednička kaj Anatonija Jozic'.

Esperantistoj ĝenerale estas scivolemaj kaj ŝatas kontaktojn kun nekonataj homoj, tiel la kongresanoj havis okazon konatiĝi kun homoj el aliaj kontinentoj de malsamaj kulturoj.

Vendrede vespere okazis la ferma ceremonio de ambaŭ eventoj. La aĝuloj kaj la ĝejnuloj bone interrilatis kaj ĝuis komunajn eventojn. Koran dankon al la organizintoj pro la bona sukceso!



Kulturo

Krimromano esperantigita kaj *Metropoliteno* nederlandigita

■ Bert de Wit

Esperanto Nederland en sia retejo (<https://www.esperanto-nederland.nl/>) antaŭnelonge publikigis du PDF-ojn de libroj, kiuj estas senpage elŝuteblaj. Temas pri la Esperanto-versio de krimromano, kiu estas bone konata en nederlandaj medioj, ĉar oni produktis ankaŭ TV-filmojn bazitajn sur la krimromanoj de la sama aŭtoro.

La titolo de la tradukita libro *Morto en Preĝo* jam povas veki tute erarajn supozojn. Plej bone estas mem eltrovi pri kio temas.

Esperanto Nederland ricevis permeson de la heredintoj de la aŭtoro (*Baantjer*) kaj de la eldonisto publikigi la PDF-on de Esperanta traduko. Ĝi estas libere elŝutebla, sed oni ne rajtas publikigi libron surbaze de tiu teksto. La traduko estas la laboro de kolektivo, kiu kunlaboris en la Amsterdama Rondo. La 16-an de aprilo okazis la ofi-



ciala «lanĉo» de la traduko en kafejo, en kiu la ĉefroluloj el la romano ofte kunvenis por trinki post sukcesa solvo de murdo. En la repaĝo de *Fenikso*, la organo de Esperanto Nederland, oni povas vidi la fotojn de tiu evento.

Alia libro kies PDF-on oni povas elŝuti, estas la traduko en la nederlandan de *Metropoliteno* de Varankin. La titolo estas *De Metro*. La libron tradukis k-dino A. Kooij-Van Holst kaj Bert de Wit kontrolis poste kaj retajpis la tekston komputile. Jam ekzistis tradukoj de *Metropoliteno* en la angla, rusa kaj germana.

Ankaŭ por turistoj la retejo de Esperanto Nederland estas interesa, ĉar troviĝas diversaj turismaj aŭ turismaj/historiaj libroj pri diversaj urboj en Nederlando. Tiel oni povas legi en Esperanto pri la historio kaj vidi la fotojn de ekzemple Amsterdamo, Harlemo, sed ankaŭ pri Alkmaro kaj Groningeno. Serĉu kaj vi trovos!

La tri ĉefurboj de Esperanto

■ Gian Carlo Fighiera

Esperanto havas tri ĉefurbojn: Varsovion, kie naskiĝis Esperanto kaj vivis ĝia kreinto, Roterdamon, kie aktivas la moderna UEA (referenc-punkto de Esperanto, rekonata de internaciaj instancoj kiel Unesko), kaj Herzberg am Harz – la Esperanto-urbon, kie nia supernacia lingvo akiris saman rangon kiel la nacia germana. Tiu grandega sukceso okazis je la unua fojo en la historio de Esperanto.

Estas, aliflanke, konate, ke en la mondo troviĝas pli ol mil rememoro-objektoj dediĉitaj al Zamenhof kaj al lia lingvo (stratoj, placoj, monumentoj, fervojaj trakoj, tabuloj ktp.), sed ke nur en Herzbergo ili atingas senkomparan rekordo-nombron, eble inter 250 kaj 300. Pro tio, la nuna artikolo limiĝas al la lasta urbo: en alia momento ni parolos pri la aliaj du.

La fenomeno Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo

Ĉio komenciĝis en la pasinta jarcento, kiam tie aktivis la fervojisto kaj esperantisto Joachim Gießner, senlaca kursgvidanto, organizanto de IFEF-kongresoj ktp., tradukanto ekz. de kelcent kantoj. Je lia memoro staras simbola monumento antaŭ la stacidomo sur la Esperanto-Placo ĉe Joachim-Gießner-Strato.

Lian pioniran laboron (Esperanto en la publiko) daŭrigis de la jaro 1976 Peter Zilvar, la estro de la regiona Esperanto-Societo Sudharco (EGS) kaj krome de 2003 – kiel ĝia vicprezidantino – la hungardevena Zsófia Kóródy. Dank' al multjardekaĵ kaj multflankaj agadoj de la regiona Esperanto-Societo

(ekzemple regulaj kursoj, seminarioj, organizado de kongresoj, kelkjardeka regula gazetara informado, regulaj fakekspozicioj, gastoj el ĉ. 70 landoj, ktp.), la 11-an de julio 2006 la kvar partioj (du regantaj kaj du opoziciaj) de la Urba Konsilantaro unuanime decidis (voĉdonis) kromnombri la urbon „Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo“ kaj „Herzberg am Harz – die Esperanto-Stadt“. Tio ne signifas, ke ĝiaj loĝantoj parolas Esperanton inter si, sed ke la urbo agnoskas la valorojn de la lingvo kaj uzas ĝin por multaj el siaj praktikaj celoj. Krome ekzistas multflankaj interagadoj kun lokaj kaj regionaj kulturasocioj, politikaj grupetoj, laborgrupoj ktp.

Efektive, jam antaŭ ol atingi Herzbergon turistoj, aŭtomobilistoj, migrantoj kaj vizitantoj rimarkas laŭlonge de la ŝoseoj kaj ĉe vojkruciĝoj bonvenigajn tabulojn en la germana kaj en Esperanto. Ekzemple en la stacidomo grandliteraj bonvenigtekstoj salutas la alvenantojn ankaŭ en Esperanto. Same okazas sur la ĉefplaco, kie longa dulingva panelo kovras la tutan fasadon de la turisma oficejo.

Ankaŭ la turismaj vojindikiloj (kun sagoj) kun la nomoj de la oficialaj instancoj estas dulingvaj: „Urbocentro“, „Juĝejo“, „Policejo“, „Biblioteko“, „Financoficejo“, „Centra busstacio“ ktp. Koncerne la urbodomon, necesas rimarkigi du faktojn: 1. Antaŭ la urbodomo (sur la ĉefplaco) flirtas la verdstebla flago dum ĉiuj gravaj Esperanto-aranĝoj (kongresoj, internaciaj seminarioj, memortagoj ktp), 2. interne de la konstruaĵo dulingvaj pordo-ŝildetoj (en verda koloro la Esperanto-versio) indikas la ejojn, ekz. „Urbestro“, „Kunsid-salono“, „Antaŭĉambro“ ktp.

Klarigaj dulingvaj informtabuloj aperas ĉe multaj vizitindaj lokoj, kiel la „Ponto de la Espero“ en la urboparto Sieber, ĉe la bulludejo sur granda stariĝilo kun esperantlingvaj ludreguloj, la vojpadoj en la parko (kie troviĝas Esperanto-benkejoj) kaj laŭ la Arbo-instrupado (la unika botanika kolekto de multspecaj arboj, ekz. kverkoj el diversaj kontinentoj) kun nomoj en la lingvoj latina, germana kaj Esperanto. Krome en Juesholz-strato troviĝas fruktarto-aleoj kun ŝildetoj kaj en la germana kaj en Esperanto.

En la mezepoka Welf-kastelo la turistoj ricevas aŭdo-gvidilon kun voĉregistraĵoj en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto.

Evidente, en Herzbergo ne povis manki granda marmorbusto de d-ro



L. L. Zamenhof sur la samnoma placo. Ĉinaj esperantistoj multe helpis organizi la kreadon de la belega blanka marmorbusto kaj de la nigrakolora postamento.

Laŭ decido de la lokaj partioj apud la Zamenhof-monumento flirtas konstante grandformata Esperanto-flago. Multaj ĵurnalistoj rimarkas, ke la internacia lingvo Esperanto ricevis ian lokan, resp. regionan agnoskon.

Se fine paroli pri nia literaturo, notindas du pliaj atingoj: la publika urba biblioteko listigas ĉ. 3000 librojn en Esperanto, dum kolekto ĉe la Interkultura Centro Herzberg arigas pliajn milojn da samlingvaj verkoj, inkluzive de multaj veraj "inkunabloj" el la fruaj periodoj de la lingvo kaj tradukojn en brajlo.

Temas pri unu el la plej riĉaj E-bibliotekoj en la mondo, kie troviĝas krom libroj kaj gazetoj multaj unikaj fak kolektaĵoj: film-arkivo, E-sonarkivo, grandega kolektaĵo de historiaj turismaj broŝuroj, medaloj, pingloj, E-filatelajoj, glumarkoj ktp.

La Interkultura Centro Herzberg (ICH)

Ĉion realigis Esperanto-Societo Sudharco (EGS) resp. Interkultura Centro Herzberg (ICH), kreitaj inter aliaj de la antaŭe menciitaj du aktivuloj, kies konstanta laborado zorgas pri la bona stato kaj daŭra ampleksigo de la materialoj. La Esperanto-Centro gastigas ankaŭ la Filion de GEA por Klerigado kaj Kulturo kaj la Asocion de Germanaj Esperanto-Instruistoj.

Jen kelkaj kromaj aktivaĵoj kaj rezultoj:

- E-kursoj en la urbaj lernejoj kaj ĉiujaraj junularaj interŝanĝoj alterne en Herzberg kaj en la pola ĝemelurbo Góra,
- E-ĝardeno (kun granda multvaria flor- kaj plantkolektaĵo), en kiu kompreneble inter aliaj Esperanto-plantoj kreskas la rara grimprozo D-ro L. L. Zamenhof,
- gastigado de esperantistaj vizitantoj (ĝis nun el pli ol 70 landoj, de Armenio ĝis Zairio). Oni povas malmultekoste tranokti en ICH.
- laŭprograma funkciigo de loka Espe-



ranto-klubo, kursoj, seminarioj, ĉiujare nova fakekspozicio en la muzeo de la bela Welf-kastelo, ellaborado de novaj projektoj por la estonteco, ekz. la aldono de „La Espero“ al la repertuaro de la Herzbergaj sonoriloj.

Multo restas farenda kaj pri tio konscias la malmultaj kunkonstruantoj, kiuj certe alfluos el la tuta mondo por helpi en la multegaj urĝaj konkretaj Esperanto-taskoj. Krom pluaj konstantaj kaj certtempaj laborfortoj mankas financaj rimedoj kaj subtenantoj por multaj realigendaj defioj.

Ni montru al la mondo pli ol nur modelcele, ke finfine Esperanto en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo trovis realan hejmon kaj ne temas pri ia fantaziaĵo por kongresemluloj, ret-amantoj kaj simile.

Rimarkoj:

1. Eĉ mondfamaj periodaĵoj, i.a. *Die Welt*, *Die Süddeutsche Zeitung* (Munkeno), *The New York Times*, atentigis pri la E-urbo. Kelkfoje dank' al DPA (Germana Gazetara Agentejo) aperis en ĉiuj germanaj ĵurnaloj longaj artikoloj kun fotoj, ekz. pri la urbestro de la Esperanto-urbo kaj la Zamenhof-monumento.

Krome okazis almenaŭ sep diversaj televidaj raportoj pri la unika „Esperanto-fenomeno“ en la reala mondo.

2. La subskribinto dum volontulado en Herzberg diris al la urbestro: „Rimarku tiun ĉi politikan signalon: la avoj dum milito pafis unu al la aliaj, kaj nun iliaj nepoj ludas kune kaj interkompreniĝas en komuna lingvo: Esperanto“.



Ĉu vi volas paperan ekzempleron de la libro "Amo, tuso kaj forpaso"?

Tuj mendu ĝin ĉe KAVA-PECH aŭ la libroservo de UEA!



Laste Aperis

Aliaj pordoj malfermiĝas. Luiza Carol. Ĵurdevac: DEC, 2023. 69p. 22cm. Kolorilus. ISBN 9789538182112. Naŭ rakontoj plenaj de ĉarmo kaj sentemo. € 12,00

Almanako Lorenz 2020. Rio de Janeiro: SEA Lorenz, 2020. 185p. 24cm. Ilus. ISBN 9788586984204. Diverstemaj artikoloj. € 4,50

Almanako Lorenz 2022. Rio de Janeiro: SEA Lorenz, 2022. 171p. 24cm. Ilus. ISBN 9788586984204. Mallongaj eseoj kaj artikoloj. € 4,50

Almanako Lorenz 2023. Rio de Janeiro: SES Lorenz, 2023. 147p. 24cm. Ilus. ISBN 9788586984204. Artikoloj kaj eseoj diverstemaj. € 4,50

Bela somero, La. Cesare Pavese. El la itala trad. C. Minnaja. Milano: IEF, 2023. 83p. 24cm. ISBN 9788896582305. Premiita triparta rakonto de junul(in)aj amo, espero kaj venko. € 13,20

Belarta rikolto 2023. Premiitaj verkoj de la Belartaj Konkursoj de Universala Esperanto-Asocio. Redaktis teamo. Novjorko: Mondial, 2023. 131p. 22cm. ISBN 9781595694553. Poezio, prozo, mikronovelo, teatraĵo, monologo/skeĉo, eseo, kantotekstoj. € 11,40

Ĉiutaga vivo kiel historio sen timo kaj sen psikiatrio, La. Antonietta Bernardoni. En Esperanton trad. A. Madella kaj L. Oberrauch. s.l.: ILEI, 2023. 98p. 21cm. ISBN 9782940665013. Kolekto de eseoj de itala kuracistino. € 12,00

Elektitaj poemoj. Željko Sabol. En Esperanton trad. J. Pleadin. Bjelovar: Bjelovara esperantista societo, 2021. 44p. 21cm. ISBN 9789535852537. Poemoj de sentema verkisto, kantaŭtoro, art-kritikisto kaj -historiisto. € 4,80

En la muziko estas la vivo de ĉeĥoj. Jan Duda. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2023. 41p. 17cm. ISBN 9788088326441. Teksto de prelego farita kadre de la 81-a Universala Kongreso, Prago, 1996. € 4,20

Esperantisti bjelovara svome gradu. Desetljeće ustrajnosti i ljubavi za Bjelovar (2013-2022). Josip Pleadin.

Bjelovar: Društvo esperantista Bjelovara, 2022. 24p. 24cm. Kroatlingva kolekto de tekstoj pri la Esperanta agado en la kroata urbo Bjelovar en la jardeko 2013-2022. € 3,00

Esperanto, L': facilità di apprendimento e aiuto nello studio di altre lingue. Alessandra Madella. Pisa: Edistudio, 2023. 305p. 21cm. ISBN 9788870368185. Kolekto de eseoj kaj intervjuoj. Itallingva. Ekzistas ankaŭ Esperanta versio. € 24,00

Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj. Alessandra Madella. Pisa: Edistudio, 2023. 287p. 21cm. ISBN 9788870360950. Kolekto de eseoj kaj intervjuoj. Ekzistas ankaŭ itallingva versio. € 24,00

Gezelle – Tyneverum. Tradukado – trukadado – literaturanalizo. Petro Desmeť. Antverpeno: FEL, 2023. 99p. 28cm. ISBN 9789077066768. Longa eseo, kun multe da ekzemploj, pri poemoj de la flandra verkisto Guido Gezelle, esperantigitaj de Hector Vermuyten (Tyneverum). € 23,70

Granda Esperanta-slovaka vortaro / Veľký esperantsko-slovenský slovník. Miroslav Malovec, Lubomír Fajth k.a. Partizánske: Espero, 2023. 613p. 21cm. ISBN 9788099902733. Ampleksa unudirekta vortaro. € 19,80

Kosmokonikoj, La. Italo Calvino. El la itala trad. N. Rossi. Milano: IEF, 2023. 107p. 24cm. ISBN 9788896582282. Dek du rakontoj sciencfikciaj aŭ, se pli konvene, fantasciencaj. € 14,10

Laboristoj de la eterna vivo. Chico Xavier. El la portugala trad. P.S. Viana. Rio de Janeiro: SEA Lorenz, 2019. 287p. 21cm. ISBN 9788594662545. La spirito Andreo Ludoviko prezentas la laboron de transtombaj amikoj, kiuj volas helpi animojn transloĝiĝi en pli altajn spiritajn regionojn. € 9,00

Lasta vojaĝo de Cezaro kaj aliaj noktaj aventuroj. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2023. 363p. 21cm. ISBN 9788088326434. Finalistaj noveloj de la dua eldono de la Interkultura Novelo-Konkurso. Kontribuis 37 aŭtoroj el 14 landoj. € 13,80

Melodio dukorda / Ni cho no shirabe. Micugi Deguč. Kameoka-si: Deguchi Zui, 2023. 24p. 21cm. Bildstrio kun iom religia fono. € 6,00

Palomar. Italo Calvino. El la itala trad. N. Rossi. Milano: IEF, 2023. 94p. 24cm. ISBN 9788896582299. Filozofia romano kun interesa strukturo. € 13,20

Pasporto. Antoine Cassar. En Esperanton trad. K. Ertl. Antwerpen: FEL, 2020. 32p. 10cm. ISBN 9789077066720. Protesta poemo pri landlimoj, migrado kaj migrantoj, amo al homoj. € 3,90

Poemoj, rakontoj kaj kokcineloj / Poemes, relats i marietes. Lola Casas. En Esperanton trad. A. Tur. s.l.: Kataluna E-Asocio, 2023. 103p. 21cm. Ilus. ISBN 9788412543438. Dulingva: kataluna, E. Tekstoj de nuntempa kataluna instruistino. € 12,60

Poezia triptiko / Pjesnički triptih. Luca Cetinić, Lidija Leskur, Jadranka Tarle Bojović. Ĵurdevac: DEC, 2021. 87p. 22cm. Bind. Dulingva: kroata, E. ISBN 9789538182068. Modernaj poemoj de tri nuntempaj kroataj aŭtorinoj. € 6,00

Postmortaj verkoj. Allan Kardec. En Esperanton trad. A. Soares kaj P.S. Viana. Rio de Janeiro: SEA Lorenz, 2020. 303p. 23cm. ISBN 9786555700848. Kolekto de gravaj tekstoj postlasitaj de Allan Kardec. € 9,00

Pratempaj rakontoj. Ivana Brlić-Mazuranić. En Esperanton trad. J. Pleadin, Z. Seleš, M. kaj A. Gropuzzo. Ĵurdevac: DEC, 2023. 160p. 22cm. Bind. Kun kelkaj desegnaĵoj faritaj de infanoj. ISBN 9789538182099. Rakontoj de unu el la plej famaj kroataj aŭtorinoj de porinfana literaturo. € 15,00

Rakontoj el la Spirita Mondo. Animo super korpo (Volumo 1). Deguč Onisaburo. En Esperanton trad. Maeda Ŝ. Kameoka-si: E-Populariga Asocio, 2023. 226p. 21cm. Fragmento el la impona verko de Deguč Onisaburo, unu el la spiritaj gvidanto de Oomoto. € 14,10

Serta gratulatoria in honorem Gerrit Berveling / Festlibro honore al Gerrit Berveling. Red. R. Corsetti. Ant-

verpeno: FEL, 2023. 124p. 28cm. ISBN 9789077066799. Deko da kontribuajoj de naŭ aŭtoroj, plus personaj memoroj kaj salutoj de aliaj kvar. € 23,70

Scienco kaj tekniko kiel rimedo por efektiviĝi daŭripovan evoluon. Div. Kompilis S. Zaratskaia, D. Slonova. Partizánske: Espero, 2021. 346p. 21cm. Ilus. ISBN 9788099902412. Kolekto de kontribuajoj prezentitaj dum la konferenco "Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko", oktobro 2020. € 16,80

Svetlana. Rakonto pri nekutima infanaĝo. Luca Cetinić. En Esperanton

trad. J. Pleadin. Đurđevac: DEC, 2023. 79p. 22cm. ISBN 9789538182082. Mirinda rakonto pri mirinda knabino. Kun desegnaĵoj de la aŭtorino. € 12,00

Tamen kantas fido. Originala poemaro. Clarence Bicknell. Red. H. Tonkin kaj M. Lipari. Milano: IEF, 2023. 218p. 21cm. ISBN 9788896582312. Originala poemaro de plurtalenta brita/itala esperantisto. € 16,50




Titus Brandsma – Sanktulo Esperantisto. Fernando Millán Romeral. En Esperanton trad. M. P. de Lacerda. Romo: IKUE, 2023. 167p. 21cm. ISBN 9788

894760606. Pri la frisa katolika esperantisto Anno Sjoerd Brandsma, pli konata kiel Titus Brandsma. € 9,00

DISKOJ

Sen timo. Kajto. Drachten: Windrose Music, 2023. Freŝa disko de la nederlanda duopo. Kun kantlibreto kaj prezento en pluraj lingvoj. Preskaŭ 50 min. KD. € 7,50

Universala arbo, La. Kajto. Drachten: Windrose Music, 2019. 14 pecoj en la konata stilo de la grupo. Kun kantlibreto kaj prezento en pluraj lingvoj. Preskaŭ 50 min. KD. € 7,50



La suprajn titolojn mendu ĉe la libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 9% por libroj kaj periodaĵoj kaj 21% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: 15% (kun minimumo de 5,00 eŭroj) por ordinara sendo. La efektivaj kostoj por aldonaj servoj (prioritata/aerpoŝta, registrita, spurebla sendo) estas plene pagendaj de la kliento. Por adresoj en EU aldoniĝas AVI (9%) ankaŭ por la sendokostoj. Antaŭdankon pro via mendo! Gisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo.

Alianco 365 estas plano por monata konstanta donacado al UEA. La celo de la plano estas garanti al nia Asocio financon ekvilibron, kontribuante por pozitiva jara rezulto, kio signifas daŭripove ebligi al UEA plenumi sian mision. Laŭ tiu plano donacantoj pretas donaci po 31 EUR monate al la Asocio, kio egalas donaci po nur 1 EUR tage. Alternative donacantoj povas fari unufojan donacon de 365 EUR por la kuranta jaro.

Kiel donaci?

Per banko:

UEA-konto en ING Bank,
Postbus 1800,
NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72 INGB 0000 3789 64,
BIC/SWIFT: INGBNL2A)

Per Paypal: vidu detalajn instrukciojn ĉe la Reta Revuo –

https://revuoesperanto.org/alianco_365.

Pri EToSo

■ Ahmad Mamduhi

Ekde la 10-a de majo ĝis la 19-a de julio 2020 mi ĉiusemajne intervjuis profesoron Renato Corsetti 10 fojojn, ĉiufoje dum pli-malpli unu horo. La intervjuoj, kiuj okazis vive per Zoom, estis publike antaŭanoncitaj tiel, ke interesigantoj povis libere partopreni en ili kaj eĉ prezenti siajn demandojn fine de mia intervjuo. Averaĝe eble ĉ. 20 personoj el diversaj landoj ĉiufoje ĉeestis la intervjuojn. La kompleta registraĵo spekteblas en: <https://www.aparat.com/playlist/517807>.

En ĉiu intervjuo mi demandis la opinion de prof. Corsetti, i.a. pri unu el la plej gravaj esperantistoj de nia movado, ekzemple Hector Hodler, Edmond Privat, Ivo Lapenna, ... kaj Tibor Sekelj. Kiam li estis parolanta pri Tibor Sekelj, kiu i.a. vojaĝis al eble ĉ. 100 landoj kaj en plejmulto el ili okazigis Esperanto-kursojn kaj/aŭ fondis Esperanto-asocion aŭ -societon, ekaperis la ideo pri la projekto «Esperanto-kursaro Tibor Sekelj» (EToSo). La projekto, kiu komenciĝis per la iniciato de la profesoro kaj per helpo kaj rimedoj de la Irana Esperanto-Asocio (IrEA), disponigas libere (senpage) senliman Zoom-konton al ĉiu, kiu deziras okazigi Esperanto-kurson en etna lingvo aŭ en Esperanto, aŭ eĉ volas instrui iun fakon aŭ arton per Esperanto al ĉiu deziranto.

Kadre de la projekto ĝis nun okazis Esperanto-kursoj en la taja (fare de Ĵaz Bharuj Rojanasoonthon), la indonezia (Ilia Dewi), ŝuahila (Nino Vessella & Élisée Byelongo), vjetnama (Hoan Tran, Ĝojo), kurda (Ŝler Karimi), araba (Jasmin Bahri & Taled Orabi), persa (Hamzeh Shafiee & mi), rusa (Tatjana Loskutova), ĉina (Liru Chen) kaj Esperanto (Renato Corsetti, Trevor Steele kaj Tatjana Loskutova). Ĉ. 90 fojojn okazis origami-atelieroj fare de Larysa Osadchuk kaj Alain Delmotte. Dankante elkore ĉiujn, kiuj ĝis nun gvidis la kursojn, mi nun reinvitas ti-

ujn, kiuj deziras komenci kurson kadre de EToSo, bv. kontakti profesoron Corsetti (renato.corsetti@gmail.com) aŭ min (mamduhi@gmail.com).

Ekde la jaro 2022 ILEI sin montras (morala) subtenanto de EToSo, i.a. per disanoncado pri ĝi por kreigi novajn kursojn en aliaj lingvoj kaj/aŭ pri aliaj fakoj.

Feliĉe la kursoj estis/as popularaj kaj fruktodonaj, kion atestas i.a. la raporto de unu el la kursanoj de la Esperanto-kurso por ruslingvanoj gvidita de Tatjana Loskutova, kiun vi povas legi ĉi tie.

■ Nikita Pimenov

Unuafoje mi eksciis pri Esperanto antaŭ kelkaj jaroj, estante adoleskanto. Ekde infanaĝo mi interesiĝas pri fremdaj lingvoj, kaj iun tagon mi trovis etan milvortan Esperanto-vortaron kaj eklernis ĝin. Tio estis la unua fojo, kiam mi eksciis pri ĉi lingvo, sed nur nominale. Ĉiujn sciojn pri la lingvo mem kaj pri la sferoj de ĝia apliko, kiujn mi nuntempe havas, mi akiris en la lecionoj de Tatjana G. Loskutova. Sed tiam, antaŭ kelkaj jaroj, mi apenaŭ povus imagi, ke ĉi lingvo havas tiom riĉan kulturon.

Eklerninte la vortaron ĝisfunde, mi tuj forgesis pri la lingvo por ĉiam: mi almenaŭ ne okupiĝis pri ĝi plene, kaj mi tute ne komprenis, por kio ĉi lingvo uzeblas. Ĝis iu februara

vespero, kiam, trarigardante la ret-novaĵojn en la rusia socia reto VK («En Kontakto»), mi trafis afiŝon anoncanta la kurson por komencantoj-ruslingvanoj de T. G. Loskutova kadre de «EtoSo».

Mi tiam pensis «kial do ne?» kaj sendis mian aliĝilon perrete. Mi ĝis nun ĝojas, ke mi decidis enskribiĝi por la kurso, ĉar danke al mia konatiĝo kun la instruistino kaj la valorega sperto, kiun donis al mi la lecionoj kun ŝi, mi ekkonsciis, ke iagrade mi volas ligi mian vivon kun la E-movado.

Jen la unua leciono baldaŭ komenciĝos. Mi estas en ekscita antaŭĝuo pri io nova (certe, tio ja estas la unua fojo, kiam mi renkontas verajn Esperantistojn!), ŝaltas la komputilon, kontrolas la funkciadon de la kamerao kaj la mikrofono. Mi sekvas la ligilon. La leciono komenciĝis.

En la unua leciono ni lernis legi. Sed ekde la dua ni jam eklernis vortojn kaj respondis simplajn demandojn. Mi estu honesta: mi pensis, ke mi fanfaronos almenaŭ pri mia posedo de vortprovizo, sed dum la lecionoj mi komprenis, kiom malmulte mi scias kaj kiom da eraroj mi faras en mia parolado. Mi neniam antaŭe praktikis parolkapablojn – estis neniu, kun kiu eblus paroli Esperante.

Ĉiu leciono estis strukturita tiel, ke ĉiuj kvar lingvaj scipovoj estis inkluditaj en ĝi: legado, aŭskultado, parolado kaj skribado. En la lecionoj ni legis eltondaĵojn el artikoloj kaj E-beletraĵojn (ĉefe fiksiĝis en mia memoro la rakonto «Mamutido Miĉjo» de Mikaelo Bronŝtejn), aŭskultis la paroladojn de aliaj Esperantistoj per sonregistraĵoj aŭ videoj (iom poste ni persone komunikis precipe kun eksterlandaj E-gastoj kaj trejnino pri du scipovoj samtempe: parolado kaj aŭskultado), ĝuste en la komenco ni jam iomete parolis kaj iel respondis la demandojn de la instruistino. Ni trejnis nin pri la skribokapablo jene: plej ofte, kiel hejmtaskon, ni skribis iom malgrandan tekston pri difinita temo aŭ skribe respondis demandojn pri iu teksto, kaj en la sekva leciono ni kontrolis tion, kion ni skribis.



Tatjana G. Loskutova

Kaj ankoraŭ pri la gastoj: poste, kiam ni atingis certan lingvonivelon, Tatjana komencis inviti diverslandajn gastojn al niaj lecionoj, kun kiuj ni komunikis. Ni konversaciis pri diversaj aferoj: kaj pri la specifaĵoj de niaj landoj kaj kulturoj, kaj pri ĉiutagaj temoj. Kutime por tio ni disponis unu horon antaŭ la leciono. Ĝi estis verŝajne la plej bona horo, kiun mi atendis ĉiusemajne. Mi tre ŝatis komuniki en Esperanto, prononci sonorajn vortojn kaj konstati, ke mi komprenas la interparolanton. Ĉiuj gastoj, post komunikado kun ni, esprimis la saman admiron pri nia lingva nivelo.

La baza kurso, ŝajnas al mi, celis lernigi paroli, kaj la mezgrada ĉefe proponis enprofundiĝi en la E-kulturon. Sed por mi, la mezgrada kurso estis bonega maniero konservi la bezonatan lingvonivelon. Ni ankaŭ multe parolis, spektis kaj aŭskultis.

Multaj diros, ke unufoja perreta leciono semajne ne sufiĉas por ellerni la lingvon, nek por plu konservi la atingitan nivelon. Sed persone por mi



tioma ofteco de lecionoj estis pli ol sufiĉa: lecionoj ne malhelpis la ĉefajn agadojn/okupiĝojn kaj, kiel montriĝis, estis sufiĉe efikaj. Tiuj du horoj semajne fariĝis ideala kialo pasive (per aŭskultado kaj legado) kaj aktive (per parolado) konservi la lingvan nivelon. Krome, mi rimarkis, ke ankaŭ mia pasiva vortprovizo pliiĝis: danke al tio, ke ni parolis nur Esperanton. Ĝuste en la komenco ni sufiĉe rapide (preskaŭ tuj) ekuzis Esperanton anstataŭ la rusa.

Nun mi vere sopiras ĉi lecionojn: mi sentas la deziron paroli Esperanton voĉe, formuli pensojn en ĉi lingvo.

Ambaŭ kursoj (la baza kaj la mezgrada) multe donis al mi. Krom la fakto, ke mi ellernis la lingvon, mi ekkonis la E-komunumon. Ĝi montriĝis tre malferma kaj mi fariĝis ĝia parto. Mi opinias, ke la ĉefa tasko de iu ajn instruisto estas pli malfacila ol nur doni certajn sciojn pri la studobjekto. Ĉi tasko estis grava en la antaŭ-informa socio. Nun la tasko de la instruisto estas ensorbiĝi amon kaj intereson pri la studobjekto, kaj tiam la studanto/kursano mem studos ĝin. Do, Tatjana G. Loskutova malfermis la E-komunumon por mi kaj montris, ke mi estas bonvena kaj utila en ĝi.

Virtuala Kongreso

4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (23-26 novembro 2023): jam eblas aliĝi kaj proponi programerojn!

Jam eblas aliĝi al la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), kiu okazos de la 23-a ĝis la 26-a de novembro 2023: <https://vk.esperanto.net/2023>.

La 4-a VK estas organizata de UEA kaj teknike realigata de E@I. Kunrealigas kaj kunprizorgas la muzikan programon la eldonejo Vinilkosmo. Ĝi estas senpaga por individuaj membroj (IM) de UEA, kiuj al ĝi aliĝos ĝis la 13-a de novembro 2023. Se vi ankoraŭ ne estas IM de UEA por 2023, eblas samtempe aliĝi al UEA kaj al la VK per la VK-aliĝilo. Aldone eblas aliĝi sen membreco en UEA kontraŭ 50 € (kotozito valida ĝis la 13-a de novembro 2023). Vidu la eblojn ĉe <https://vk.esperanto.net/2023>. Dum aliĝo eblas ankaŭ libere donaci por la okazigo de la 4-a VK: tiuj, kiuj donacas super 50 €, aperas kiel Subtenanto. La donacoj helpas nin altigi la teknikan kvaliton kaj aldone proponi la VK-n al diver-

saj homoj en la mondo, kun aparta atento al junuloj kaj virinoj, ampleksigante niajn atingojn kaj diversigante nian movadon. Antaŭdankon pro via subteno!

La 4-a VK okazas sub la temo "Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj", kiel de la 108-a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Torino.

Aldone al la kongresa temo, denove ĝi gastigos varian programon, sciencon, kulturan, movadan, inkluzive de la Virtuala Movada Foiro (ViMF). Ni invitas ĉiujn pliriĉigi la programon. Se vi ŝatus kontribui, vi estas bonvena kundi-vidi kun ni vian programproponon per la jenaj formularoj:

- por la kerna programo: <https://mallonge.net/VK4-programproponilo>
- por la Virtuala Movada Foiro: <https://mallonge.net/VK4-ViMF-proponilo>

Aldone UEA tenas konstantan fondaĵon por la Virtuala Kongreso: https://uea.org/alighoj/donacoj/virtuala_kongreso. Ankaŭ eblas donaci per ĝi. La programo de la 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto aperos en la internacia kalendaro de UEA kaj TEJO: <https://eventaservo.org>.



Kováts, Löwenstein kaj Tchikpe – novaj honoraj membroj de UEA, Corsetti – nova Honora Prezidanto, elektitaj en Torino

Laŭ la Regularo pri Honoraj Membroj, Honoraj Prezidantoj kaj Diplomo pri Elstara Agado, la Komitato de Universala Esperanto-Asocio (UEA), surbaze de propono de la Estraro de UEA, povas aparte distingi esperantistojn, kiuj faris gravajn servojn al la tutmonda Esperanto-movado, per la titolo Honora Membro (HM). Krome, kiel Honora Prezidanto (HP) povas esti nomumita esperantisto, kiu aldone havis eksterordinarajn meritojn por UEA.

Dum sia unua kunsido en Torino la Komitato elektis 3 novajn HM-ojn: Katalin Kováts, Anna Löwenstein kaj Privas Tchikpe. Aldone estis elektita unu nova HP: Renato Corsetti.

Sube sekvas resumoj de la vivpriskriboj, gravaj datoj, verkoj kaj/aŭ meritoj de la kandidatoj (pli detalajn biografiojn ricevis la Komitato, arkivitajn en la komitata elŝutejo de UEA: <https://uea.org/tekol/komitato>).

Kováts, Katalin



D-ino Katalin Kováts naskiĝis en Budapeŝto, la 16-an de oktobro 1957. Ŝi estas hungara esperantisto, pedagogo, lingvisto kaj instruisto. Ŝi estas fondinto en 2001 kaj redaktoro de la paĝaro Edukado.net; estis ano de la Akademio de Esperanto de 2007 ĝis 2022; kaj Esperantisto de la Jaro en 2010. En UEA ŝi estas ekde 2009 la motoro de la Ekzamenoj laŭ la Komuna Eŭropa Referencadro (KER-ekzamenoj) kaj same

unu el la ĉefaj profesoroj de la Interlingvistikaj Studoj ĉe la Universitato Adam Mickiewicz. Ŝi verkis diversajn instrucelajn verkaĵojn, inter kiuj furoras *Poŝamiko*. En 2005 ŝi tradukis la memtaksilon de la KER-ekzamensesio kaj aperigis ĝin en la *Manlibro pri instruado de Esperanto*, kiun ŝi redaktoras. Ŝi estas dumviva membro de UEA.

Löwenstein, Anna



Anna Löwenstein naskiĝis en Britujo la 8-an de marto 1951. Ŝi estas esperantisto, redaktoro kaj verkisto. Ŝi estis elektita Esperantisto de la Jaro 2019. Löwenstein laboris de 1977 ĝis 1981 en la Centra Oficejo de UEA, kie ŝi redaktis la Jarlibron de UEA en 1981. Ŝi estis redaktoro de la facila parto de *Kontakto* (kaj krome verkinto de la listo de 1000 morfemoj uzataj en la facila parto) de 1983 ĝis 1986. Ŝi estas membro de la Akademio de Esperanto ekde 2001. En UEA ŝi estas la fondinto kaj motoro de la Movada Foiro en la UK-oj. En 2019 ŝi kreis <https://uea.facila.org>, retejon kun mallongaj kaj facilaj artikoloj por novaj esperantistoj, kiun ŝi ĉefredaktoras. Ŝi partoprenis en pli ol 28 eldonoj de UK kaj estas membro de UEA de pli ol 40 jaroj.

Tchikpe, Privas

Privas Tchikpe naskiĝis en Benino en 1963. Krom Esperanton, li parolas



la aĝaan, la fonuan, la francan kaj la anglan. Li esperantistiĝis en 1981 kiel la unua esperantisto en Benino. Kun kelkaj amikoj siaj, al kiuj li instruis Esperanton, li fondis en la jaro 1983 la unuan landan asocion de Benino, Benanan Esperanto-Asocion, kiun agnoskis la Ministerio pri Internaj Aferoj. En la jaro 2009 li fondis kun Mireille Grosjean el Svislando la asocion Scio Sen Bariloj (SSB), neregistaran organizon, kiu laboras por ebligi aliron al lertigado de homoj. Kerna agado de SSB estas la disvastigo de Esperanto kaj virina kapablo al gvidaj roloj. En 1991 li organizis kiel prezidanto de LKK sukcesan duan Afrikan Kongreson de Esperanto en Kotonuo, kun partopreno de dekoj da eksterafrikaj esperantistoj. En 2013, li denove estis prezidanto de la Kongresa Organiza Komitato (KOKO) respondeca pri la okazigo de la kvina Afrika Kongreso de Esperanto. Okaze de la 104-a UK en Lahti, Finnlando, en 2019, li ricevis Diplomon pri Elstara Agado de UEA rilate al sia gvidado de Scio Sen Bariloj. Li estas dumviva membro de UEA.

Corsetti, Renato

Renato Corsetti naskiĝis la 29-an de marto 1941 en Romo. Li estas esperantisto ekde la 1960-aj jaroj. Li havis multajn postenojn en la movado, estis interalie prezidanto de TEJO kaj prezidanto de Itala Esperanto-Federacio. En



UEA li deĵoris en la Estraro de 1980 ĝis 1986 kaj 1998 ĝis 2007, la lastajn ses jarojn kiel Prezidanto de UEA. En 1998 li estis elektita membro de la Akademio de Esperanto kaj ekde 2020 li denove anas en la skipo de lingvaj konsilantoj de *Monato*. Li verkis en Esperanto kaj en la itala pri lingva politiko, Esperanto, infana dulingveco, psikopedagogio de lingvo kaj komunikado. Li jam estas honora membro de UEA kaj honora prezidanto de TEJO.

Ĝis Torino estis 23 HM-oj, el kiuj neniun venis el Afriko (tiam 17 devenis el Eŭropo, 5 el Azio kaj 1 el Ameriko). La Estraro konsideris, ke per elekto de merita homo kiel Privas Tchikpe la listo ekgajnas pli valoran diversecon. Same pri reprezenteco de virinoj inter la HM-oj: el la antaŭaj 23 HM-oj nur 3 estis virinoj. La elekto de me-

ritplenaj virinoj kiel Katalin Kováts kaj Anna Löwenstein same kreskigas tiun reprezentecon. Tiuj aspektoj gravas por la tutmondeco kaj diverseco de UEA.

Rilate HP-ojn, UEA restis sen HP inter 1974 kaj 2020, kiam la Komitato akceptis la proponon de la Estraro por nomumo de Humphrey Tonkin kiel HP de UEA. Antaŭe la Asocio havis paralele inter 2 kaj 3 HP-ojn. La Estraro konsideras plene laŭmerite kaj la Komitato akceptis do nomumi ankaŭ Renaton Corsetti nova HP de UEA. Lia biografio mem tion pravigas, tamen estis des pli speciale, ke tio okazis dum UK en Italio, lia devenlando, kaj kiam oni agnoskis ankaŭ lian meritplenan edzinon, Anna.

La listo de nuntempaj HM-oj kaj HP-oj de UEA estas ĉe uea.org/asocio/honoraj_oficoj.

Kulturo

Biblioteko Juan Régulo Pérez en la Kolektiva Katalogo de la Hispana Bibliografia Heredaĵo

■ Ana Manero

Biblioteko Juan Régulo Pérez (BJRP)¹, apartenanta al Hispana Esperanto-Federacio, integriĝis en la Kolektivan Katalogon de la Hispana Bibliografia Heredaĵo (*Catálogo Colectivo del Patrimonio Bibliográfico Español, CCPB*)², dependa de la Ministerio de Kulturo kaj Sporto (*Ministerio de Cultura y Deporte*).

La celo de ĉi kolektiva katalogo estas priskribi kaj lokalizi la librojn kaj aliajn bibliografiajn materialojn apartenantajn al hispanaj bibliotekoj, publikaj aŭ privataj, kiuj pro siaj antikveco, unikeco aŭ riĉeco estas parto de la Hispana Historia Heredaĵo.

La katalogo realiĝas laŭ la Leĝo 16/1985 pri Hispana Historia Heredaĵo (*Ley 16/1985 del Patrimonio Histórico Español*) kaj inkludas ĉiajn materialojn eldonitajn ĝis 1958. Ĝin preparas kune la Ministerio de Kulturo kaj Sporto pere de sia Ĝenerala Direkcio de la Libro, de la Komikso kaj de la Legado (*Dirección General del Libro, del Cómic y de la Lectura*) kaj ĉiuj Aŭtonomaj Komunumoj.

La Kolektiva Katalogo de Bibliografia Heredaĵo estas daŭre evoluanta projekto en konstanta procezo de vastiĝo kaj polurado. Nuntempe, la plimulto el la rikordoj priskribas malsamajn eldonojn de verkoj presitaj inter la 15-a kaj 20-a jarcentoj (ĝis 1958, kiel dirite), same kiel la specifajn ekzem-

plerojn de tiuj eldonoj, kiuj troviĝas en hispanaj bibliotekoj.

BJRP iniciatis la kontakton kun CCPB en oktobro 2021. La propono pri integriĝo estis varme akceptita de la institucio kaj tiun saman monaton HEF subskribis dokumenton, kiu rajtigas CCPB-on diskonigi la datenojn kaj lokalizojn de niaj ekzempleroj.

La kunlaboro inter ambaŭ institucioj estas de tiam konstanta, kaj kvankam pro diversaj kialoj la laboro iris malrapide dum la pasinta jaro, eblas jam trovi en CCPB kelkajn el la ekzempleroj de nia biblioteko.

¹ <http://biblioteko.esperanto.es>

² <http://catalogos.mecd.es/CCPB/ccpbopac/>

Benvingut | Benvido | Ongi Etorri | Benvingut | Welcome | Bienvenue |



Catálogo Colectivo del
Patrimonio Bibliográfico Español



Inicio | ¿Qué es el CCPB? | Bibliotecas | Nuestros proyectos | Contacto | Ayuda | Preguntas frecuentes

UEA invitas proponojn prelegi en IKU 2024 en Aruŝo

■ Amri Wandel

Kadre de la 109-a UK en Aruŝo, Tanzanio, okazos la 77-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato (IKU). UEA invitas proponojn por IKU-prelegoj, kiuj estu sendataj al la IKU-sekretario amri@huji.ac.il plej laste la 31-an de januaro 2024. Lige kun la IKU okazos studsesio de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS) kaj la Scienca Kafejo (SK). Kandidatoj por IKU-prelego povas samtempe proponi AIS-kurson, kiu konsistas el unu IKU-prelego, 1-2 kromaj prelegoj kaj eventuale ekzameneto. Eblas ankaŭ proponi nur por la SK, kiu konsistas el pli mallonga (ĉ. du-onhora), pli popularnivela prelego. Bonvolu indiki, ĉu via propono estu konsiderata ankaŭ kiel AIS-kurso, aŭ nur por la SK. Kiel en Montrealo kaj Torino, oni planas ankaŭ viv-elsendojn de la IKU-prelegoj.

La proponoj estu pri interesaj, allogaj temoj kaj taŭgaj por klera publiko. Ĉiu propono enhavu mallongan resumon de la prelego kaj koncizan biografieton de la preleganto, ĉiu de amplekso de proksimume kvin linioj. Aparte estas bonvenaj proponoj de personoj, kiuj ne jam aŭ malofte prelegis en IKU. La proponoj estos profesie prijuĝitaj de la

IKU-komisiono. Tiuj, kiuj ne estos elektitaj por la IKU, povos tamen esti konsiderataj por la SK. Ĉiu preleganto devas esti kongresano kaj mem zorgi pri sia aliĝo (uk.esperanto.net/2024).

Akceptita IKU-prelego estos rekompencita per honorario de 240 EUR. Por IKU-AIS-kurso la honorario estos 300 EUR kaj por Scienca Kafejo – 120 EUR. Duono de la honorario dependas de ĝustatempa livero de la teksto por la IKU-libro kaj duono – de la fizika prezentado de la prelego. Pliaj detaloj kaj antaŭaj prelegoj kaj resumoj troviĝas en la retejo de IKU: uea.org/kongresoj/universitato.

Kiel la Rektoro estis nomumita d-ro Élisée Byelongo, de Kongo D.R. kaj Sud-Afrikio.




Ĉu unua spuro de vivo ekstertera? JWST observis signojn de eventualaj oceano kaj vivo en 2K-18b

Post la fermo de la oktobra n-ro estis publikigita esploro kiu eble heroldas la unuan signon pri ekzisto de biologia vivo ekstertera: sciencistoj observintaj la eksterplanedon 2K-18b per la nova spacteleskopo James Webb anoncis la malkovron de molekuloj kiuj surtere estas produktitaj en biologiaj procezoj: <https://mallonge.net/13y>. La malkovro ankaŭ subtenas la ekziston de oceano, kiel klarigas la ĉefesploristo en por-gazetara video publikigita de la Kembriĝa universitato: <https://mallonge.net/13z>. Pli detala raporto aperos en nia novembra rubriko.



Daŭre aĉeteblas ĉe la Libroservo de UEA la papera **IKU-libro 2023**, 241 p., 19 IKU- kaj SK-prelego-tekstoj kaj tri-lingvaj resumoj kaj multaj ilustraĵoj (<https://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7606>) kaj IKU-libroj de antaŭaj jaroj.



Reĝo Ubuo nun groteskas ankaŭ Esperante

■ Sten Johansson

Alfred Jarry, Reĝo Ubuo. 110 p. Esperanto-France, Parizo 2023.


Prezo ĉe UEA: 10,50 €

Alfred Jarry estas unu el la plej bizaraj aŭtoroj de la franca literaturo. Li naskiĝis en 1873 kaj mortis en 1907 pro tuberkulozo kaj alkoholo. Li verkis precipe dramojn, kaj en la kultura avangardo de Parizo ĉirkaŭ la jaro 1900 li estis konata persono, kiu per sia groteska figuro Patro Ubuo fariĝis antaŭulo de la posta absurdisma teatro. Lia plej grava verko estas *Ubu Roi*, kies premiero en 1896 fariĝis fama skandalo, kiam parto de la publiko laŭte protestis kaj forlasis la teatron jam post la unua dirita vorto *Merdre!*

La dramo *Ubu Roi* estis stranga kombino de adoleskula moko al malamata licea instruisto, satiro pri krualeco kaj intrigoj de potenculoj, temo eble inspirita de *Lady Macbeth*, kaj lavango da trivialaĵoj kaj obscenaĵoj en Rabeza stilo – ĉio en lingvaĵo farĉita per propraj kreaĵoj. Antaŭ ĉio ĝi estis konfronto al la burĝa bona gusto, kaj tio pli ol sufiĉis por eternigi ĝin. Eble la kerno de la verko entenigas en demando de Patro Ubuo: *Ĉu la malĝusta rajto ne samvaloras la ĝustan?*

Traduki ĉi tiun verkon en iun ajn lingvon certe ne facilas, des malpli en Esperanton. Necesus grandaj krea talento kaj libereco. Oni povus revii, ke ia Raymond Schwartz, Lorjak aŭ eble István Ertl alfrontus la taskon. Sed faris tion Thomas Larger kaj Thierry Tailhades, pri kies aliaj verkoj mi scias

nenion. Jam por la menciita komenca vorto oni bezonus sukan kaj liberan kreokapablon. Ĝi konsistas el la kutima sakraĵo *merde* (= merdon aŭ fek') plus la verba finaĵo *-re*, kiu pensigas pri sakraĵoj pli fortaj kiel *foutre* kaj *bougre* (= fiki kaj bugri). En la Esperanta *Reĝo Ubuo* tio fariĝis *fekr*, kio – eĉ se oni sukcesas prononci ĝin – ŝajnas al mi ĉefe kurioza.



La plua traduko tamen fluas sufiĉe bone. La originalo enhavas amason da malnovaj vortoj apenaŭ plu uzataj, kiujn Jarry elfosis el la historio de la franca lingvo. Da tiaj Esperanto ja posedas malmultajn, do *Reĝo Ubuo* preskaŭ neeviteble fariĝas pli plata, malpli aparta, ol la originala *Ubu Roi*. Aperas ankaŭ vortoj elpensitaj de Jarry mem, miksitaj kun trivialaĵoj. Plurajn elek-

tojn de la tradukintoj mi trovas bonaj aŭ tute akcepteblaj, kiel la Schwartz *skorzonero!* por la originalaj *ventrebleu* kaj *sapristi*, *fava fiulo* por *gueux voyou*, *blato* por *bouffre* kaj *ventujo* por *bouffine*, *farbi sian ventron* por *se brosser le ventre*. Aliaj estas pli strangaj, kiel *vurz* por *vrou*, *zamformeo* por *jarnicoton*, *stafulo* por *estafier*, *hon!* por *hon!* aŭ *satistoj* kaj *rumistoj* por *voraces* kaj *coriaces*. Nu, tiaj strangajĵoj ne multe ĝenas en verko jam originale plena de diversspecaj strangajĵoj.

Kelkfoje mi tamen demandas min, kiom Larger kaj Tailhades fakte konas la Esperantajn lingvon kaj kulturon. Por *chacun son goût* ili uzas nenium el la eblaj Zamenhofaj proverboj, ekz. *en ĉiu brusto estas sia gusto*, eĉ ne la rektan tradukon *ĉiu havas sian guston*, sed *ĉiu havas sian ŝaton*. Kaj por *fichez le camp* kaj *foutre le camp* ili ŝajne ne konas la esprimon *forfikiĝi*, sed uzas sensukajn *foriri* kaj *forkuri*. Cetere, aperas eĉ lingvaj fuŝetoj, kiujn lerta provleganto facile elsarkus, kiel *sufoki* (= sufokiĝi), *ŝteli* (= priŝteli), *malantaŭ* (= malantaŭe) kaj aliaj. Tamen ĉe traduka tasko ĉi tiel aparta preskaŭ ne eviteblas ke la tradukaĵo fariĝas jen pli plata, jen pli stranga ol la originalo. Kiel tutaĵon mi trovas ĝin tolerebla, kaj plimulto de la legantoj sendube pli ĝuos la spritajn solvojn ol plendos pri makuletoj. Al ĉiuj, kiuj ĝis nun ne konas la verkon, kaj eĉ al tiuj, kiuj jam konas ĝin nacilingve, mi do povas – *je mia verda kandel* – rekomendi legadon de *Reĝo Ubuo*.

La verko aperas kiel numero 62 en la serio Oriento-Okcidento de UEA.

Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpas nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!

100 jaroj de Sarlanda Esperanto-Ligo

■ Martin Thorenz

En oktobro de la jaro 1923 kunvenis esperantistoj el la tuta tiel nomata „Saar-teritorio“ por fondi la unuan tutlandan Esperanto-Ligon, la „Esperanto-Ligon de la Saar-teritorio“.

Dum la nazia reĝimo, ĉiuj Esperanto-asocioj estis ŝtate malpermesataj kaj post la Dua Mondmilito daŭris ankoraŭ kelkajn jarojn ĝis la esperantista vivo restariĝis. En la jaro 1951 refondiĝis la sarlanda organizo kiel „Sarlanda Esperanto-Asocio“ kaj ŝanĝis sian nomon ankoraŭfoje en la jaro 1959 al „Sarlanda Esperanto-Ligo“.

Pro la kronvirusa pandemio ne okazis asocia laboro dum preskaŭ tri jaroj kaj oni preskaŭ pretervidis la alvenantan jubileon. Pro tio la decido

festi la ligan fondiĝon estis spontane kaj entuziasme farita.

Sarlanda Esperanto-Ligo festos sian 100-jariĝon per Jubilea Kultura Semajnfino de la 13-a ĝis la 15-a de oktobro 2023 en la Kardinal-Wendel-Domo en Homburgo (<https://www.kardinal-wendel-haus.de/>).

Atendas vin interesa programo konsistanta el diversaj prelegoj por Esperanto-parolantoj, kursoj por progresintoj kaj komencantoj. En la libroservo vi certe trovos allogajn legaĵojn kaj esperantaĵojn.

Ni komencos la semajnfinojn jam vendrede posttagmeze per la alvojaĝo de la partoprenantoj kaj post la vespermanĝo ni kunsidos en etosa rondo por (pli bone) interkonatiĝi. La tutan sabaton kaj la dimanĉon ni dediĉos



al prelegoj, lingvokursoj kaj ekskursoj en la urbo aŭ en la ĉirkaŭaĵon.

La kulmino de la Jubilea Kultura Semajnfino estos la festvespero sabate. Jam antaŭĝoju pri bela, bongusta festbufedo en solena etoso!

La aliĝilon vi trovas en nia retejo <https://www.esperanto-sarlando.info/arangoj/>.

Oficiala Informilo

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



DUMVIVAJ MEMBROJ

Francio: L. Le Nepveu.
Usono: D.G. Simpson.

SOCIETO ZAMENHOF

Britio: R. Maertens.
Finlando: J. Pietiläinen.
Francio: F. Lo Jacomo.
Germanio: T. Bormann, M. Haase.
Italio: M.T. Malatesta.
Meksiko: M. Martínez Mateos.
Nederlando: H. Heida.
Usono: S. Brodd.

PATRONOJ de TEJO

Brazilo: M. Barcellos.
Britio: O. Kovyazina, M. Peperell.
Francio: D. Cornichet-Le Fol, G. Darrieux.
Germanio: M. Haase.

Israelo: J. Tilleman.
Reunio (Fr.): M. Savignat-Belhote.
Slovakio: M. Ronco.
Usono: L. Mesenko.

DONACOJ

ĝis la 5-a de septembro 2023

Amsterdama Katedro pri Interlingvistiko kaj Esperanto
Nederlando: Esperanto Nederland 750,00.
Sumo ĉi-jara: 9600,00.

Fondaĵo Afriko
Francio: Centre culturel Nantes Espéranto 300,00.
Italio: M. Malatesta 700,00.
Svedio: L. Holmlund 200,00.
Usono: M. Kennedy 200,00.

Diversaj landoj: pere de ulule.
com 2392,82.
Por la UK en Arusha (Tanzanio):
Finlando: B. Eriksson 150,00.
Sumo ĉi-jara: 9649,05.

Fondaĵo Ameriko
Usono: M. Kennedy 100,00.
Sumo ĉi-jara: 220,76.

Fondaĵo Azio
Japanio: Hirotaka M. 17,35.
Nederlando: P. Coppens 200,00.
Sumo ĉi-jara: 647,98.

Fondaĵo Canuto
Finlando: B. Eriksson 120,00.
Francio: P. Chavignon 10,00;
G. Darrieux 100,00.
Luksemburgo: I. Ertl 60,00.
Nederlando: R. Moerbeek 75,00;
F. van Zoest 50,00.
Sumo ĉi-jara: 1187,49.

Konto Espero
Israelo: J. Tilleman 20,00.
Usono: M. Kennedy 100,00.
Sumo ĉi-jara: 564,00.

Konto Informado
Ĉiuj por „Bienalo Rio“:
Brazilo: F. Maia Jr. 150,00.
Germanio: A. Nonima 255,00.
Sumo ĉi-jara: 1000,00.

Fondaĵo Partoprenu UK-n
Francio: P. Chavignon 10,00;
G. Darrieux 100,00.
Reunio (Fr.): M. Savignat-Belhote 20,00.
Sumo ĉi-jara: 222,00.

Fondaĵo Wüster
Kolombio:
M. Herrera Barrera 12,00.
Sumo ĉi-jara: 12,00.

Ĝenerala Kaso
Aŭstralio: A. Nonima 8,97.
Britio: M. Peperell 9,07.
Nederlando: S. Smits 500,00;
F. van Zoest 50,00.
Usono: D. Becker 30,00;
L. Gregg 32,38;
M. Kennedy 100,00.
Alianco 365: 100,00.
Sumo ĉi-jara: 7253,31.

D-ro Ferenczy Imre (25.07.1932 – 01.09.2023)

Forpasis la 1-an de septembro 2023, en Győr, en la aĝo de 91 jaroj, la hungara fervojista kuracisto D-ro Ferenczy Imre. Li naskiĝis la 25-an de julio 1932. De 1950 li okupiĝis pri Esperanto, do sindediĉanta al la lingvo dum 73 jaroj. Li estis konsiderata la plej maljuna aktiva hungara esperantisto kaj partoprenis en ĉirkaŭ 40 Universalaj Kongresoj.

Aktiva pri Esperanto ekde 1950, kiam li estis 18-jaraĝa, jam en 1955 li kunfondis Hungarlandan Esperanto-Konsilantaron. Ĝis 1960 li prezidis la junularan fakon de Hungara Esperanto-Asocio (HEA) kaj de 1962 ĝis 1970 li estis junulara gvidanto de Internacia Fervojista Esperantista Federacio (IFEFF). Li estis fondinto kaj prezidanto de la hungara sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Radio-Amatoroj (ILERA) kaj de la hungara sekcio de la Internacia Fervojista Radio-amatora Asocio. Lia voksigno estis HA1UD. Pro instigo lia, ekde 1982 funkcias radioamatora stacio kun speciala voksigno en la IFEFF-kongresoj.

D-ro Ferenczy diplomiĝis en la Universitato de Szeged kaj poste en la Universitato de Medicinaj Sciencoj en Budapeŝto, akirante ĝeneralan medicinan diplomon en 1957, 25-jaraĝa. Li laboris pri interna medicino en la hospitalo Parádfürdő inter 1957 kaj 1960, kaj poste li translokiĝis al la MÁV-hos-



pitalo en Pécel por unu jaro. Inter 1961 kaj 1998, li laboris kiel la ĉefoperaciisto de la fervoja nodo Győr. Li ankaŭ aktivis kiel sportkuracisto kaj zorgis pri sama futbala teamo, futbal-grupo Győri MÁV DAC (nun Integral DAC), 43 jarojn sen interrompo (1963-2006). Pro tio li ricevis diplomon kiel „Hungara rekordulo“.

En 1970 li iĝis privata sekretario de D-ro Hideo Shinoda. Inter 1977 kaj 2000 li estis la gvidanto de la medicina fakkomisiono de HEA. Ekde 1985 li longtempe okupis la postenon de prezidanto de Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA) kaj samtempe estis membro de la redaktantaro de *Medicina Internacia Revuo* (MIR), la organo de UMEA. En Varno (Bulgario)

dum la 63-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), en 1978, li ricevis la Premion Shinoda de UMEA pro sia elstara medicinmovada agado. En 2007 en Budapeŝto ĉe la Medicina Universitato Semmelweis li ricevis la jubilean oran diplomon pro sia 50-jara kuracista agado, en 2017 li ricevis la diamantan diplomon kaj en 2022 la feran diplomon.

Li aŭtoris du verkojn, *Esperanta Medicina Vortaro* (2009) kaj *Mi estis fervojista kuracisto* (2012). Li modele kunlaboris kadre de la Faka Agado de UEA kiel reprezentanto de UMEA kaj aparte pri la kunlaboro inter Fakaj Asocioj (UMEA kaj IFEFF). Kiel reprezentanto de UMEA li partoprenis tre multajn Universalajn Kongresojn ekde la jaro 1973. Krom en eŭropaj landoj li estis en Kubo, Koreio, Kanado, Aŭstralio, Israelo, Brazilo, Ĉinio kaj Japanio. Medicinan studvojaĝon li faris en Usono en la jaro 1998. Seninterrompe dum tridek jaroj, inter 1983 kaj 2013, li estis membro de la Komitato de UEA, kiel reprezentanto de UMEA.

Li estis nomumita Honora Membro de HEA (1994) kaj Honora Membro de UEA (2003). Li estis Honora Prezidanto de UMEA.

UEA kaj ĝia aliĝinta faka asocio UMEA kondolencas la parencojn, kunlaborantojn kaj amikojn. Vivo tia, plena je sindediĉo al Esperanto kaj diversaj fakoj de la homaro, estu por ĉiu esperantisto inspiro.

(El GK de UEA: uea.org/gk/1124a1)



Societo Zamenhof

Aliĝu ankaŭ vi al tiu klubo de mecenatoj de UEA!
Vi ricevos leterojn de la prezidanto de UEA kaj inviton
al akcepto en la Universala Kongreso.
La kotizon (duoblo de MA por via lando) vi povas pagi
al via peranto aŭ rekte al UEA.

Pliaj informoj ĉe <https://uea.org/alighoj>



4-a Virtuala Kongreso de Esperanto

23-a ĝis 26-a de novembro 2023

"Enmigrado – kunfluo de homaj valoroj"

Aliĝu: <https://vk.esperanto.net/2023>